



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Novembro 2017 n-ro: 23



Merhaba,

Ĝuste 23. ve Kasım 2017 sayımız. Umarız bu sayımız da hoŝunuza gider. Bu sayıda da gene ilginç yazılarla karŝınızdayız. Esas önemli olan dergimize özel hazırlanıp gönderilmiş yedi deęişik ÷lkeden yedi tane yazı olması:

- "La konspiro de la literoj" (Bulgaristan)
- "La viro kiu parolas por la rozoj" (Fransa)
- "Je la memoro de D-ino Marjorie Boulton" (Pakistan)
- "La grandanima koro" (Polonya)
- "Agnostikisma pasko" (Romanya)
- "Mi surteren kuŝas kun anęelo" (Türkiye)
- "La bieno de la monaĥo" (Yunanistan)

Ayrıca seri yazıların ve bazı blog, dergi, ve iletişim yayınlarından aldığımız yazıların dıŝında toplam 12 deęişik ÷lkeden yazı mevcut: ABD, Brezila, Bulgaristan, Çin, Fransa, İspanya, İtalya, İzlanda, Japonya, Pakistan, Polonya, Romanya, Türkiye ve Yunanistan.

Bu arada abone sayımız da 250 yi geçmiş bulunuyor...

Hepinize iyi okumalar...

Saluton,


Jen nia 23-a kaj novembra 2017 numero. Ni esperas, ke ĝi plaĉos a vi. Ankoraŭfoje tiu ĉi numero enhavas diversajn ka interesajn artikolojn por vi. Pli grava estas, ke ĝi enhavas sep originalajn verkaĵojn, senditaj rekte al nia revueto:

- La bieno de la monaĥo (Grekujo)
- La konspiro de la literoj (Bulgario)
- Mi surteren kuŝas kun anęelo (Turkujo)
- La grandanima koro (Pollando)
- La viro kiu parolas por la rozoj (Francio)
- Agnostikisma pasko (Rumanio)
- Je la memoro de D-ino Marjorie Boulton (Pakistano)

Krom la seriaj artikoloj, kaj tiuj kiujn ni prenas el blogojn, ĵurnalojn, revuojn ktp ĝi enhavas verkaĵojn el 12 diversaj landojj: Brazilo, Bulgario, Ĉinio, Francio, Grekujo, Hispanio, Islando, Italio, Japanio, Pakistano, Pollando, Rumanio, Turkujo, Usono.

Interalie la nombro de niaj abonantoj jam superis la 250.

Bonan legadon al ĉiuj...



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Esperanto-Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leterojn ni ricevis el geamikoj	4
EU financos studon pri Esperanto	4
je la memoro de D-ino Marjorie Boulton	5
Agnostikisma Pasko (poemo de M.Boulton)	7
20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj	8
La viro, kiu parolas kun la rozoj	9
Eŭropa kaj Eŭropo	11
Avantaĝoj de dulingvismo (parto 2/2)	12
Poemoj de Edward Jaśkiewicz	14
Poemo de Angel Arquillos	14
Esperanto kiel kultura heredaĵo estas...	15
Patro kaj filo (1/2)	16
2018 Tut-Amerika Kongreso de Esperanto	18
La grandanima koro	18
50 jarojn post la unua nuklea eksperimento...	19
Émile Boirac	21
Araby, rakonto de James Joyce en Esperanto	22
"Aĉeti tempon" feliĉigas	24
Nur mil parolantoj de Esperanto en Ĉinio	25
Lingvolernado laŭ aĝo kaj kapablo	26
Mi surteren kuŝas kun anĝelo	27
El la libro de "Dao de Jing" (15)	28
Dankon Amiko (10)	29
La konspiro de la literoj	29
Ŝercoj	30
Kurcvort-enigmo	30
UEA pledas por ne-perforto	31
La bieno de la monaĥo	32
Mallonga Historio de Filozofio (21)	33
Esperanto Kurso (22)	34
Kuiru kun mi	36
Kiu estas via Esperanto Nivelo	36
Filmo pri la 102-a UK en Seulo	36

Kursoj



1) Okazas du kursoj en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul.
(a) La unuan kurson gvidas Nicholas Sarmiento kiu instruas al ok komencantoj, (7 lernantoj kaj 1 iinstruisto). Jen foto el la kurso de Nicholas:



Foto el la kurso de Nicholas Sarmiento en Üsküdar Amerikan Lisesi

(b) La duan kurson gvidas Murat Özdizdar, kiu instruas al sep komencantoj, (4 lernantoj kaj 3 iinstruisto).

Ambaŭ kursoj daŭros dum la tuta lerneja jaro.

2) Komenciĝis la kurso por Esperanto interesiĝantoj en Kadıköy distrikto en Özgen Berkol Doğan Sciencfikcia Biblioteko (vidu Turka Stelo #21 p.22). La kurso estas pagata kaj daŭros dum tri monatoj. Estas 8 lernantoj en la kurso. Jen foto el la kurso:



Foto el la kurso en Özgen Berkol Doğan Sciencfikcia Biblioteko

3) La kurso por komencantoj en Celal Bayar Universitato ne okazas ĉijare.

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



En la 49-a sumoo koreaj partoprenantoj draste malmultiĝis kaj svisaj gelernantoj ne partoprenis, tial la

nombro de partoprenantoj ne superis 300.

Analizo

1. **Partoprenantoj:** 283 el 32 landoj

2. **Laŭlandaj nombroj:**

Japanio:79

Francio:31

Koreio:27

Pollando:20

Brazilo:17

...

Turkujo:2

3. **Perfektaj venkintoj** (15 venkoj): 249 el 283 (87,98%)

4. **Kvanto de legitaj paĝoj:** pli ol 15 000 paĝoj. Averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj de la sumoo.

La 49-a novembra sumoo okazos la 12-an de novembro dum 15 tagoj. Ni atendas vian partoprenon.

Jen nia retejo: <http://www.esperanto-sumoo.strefa.pl/index.html>

Jen nia facebook grupo:<https://web.facebook.com/groups/759066970888217/>

foto de partoprenantoj el Koreio:



UEA



N-ro 708 (2017-10-13)

Biblioteka Apogo Bachrich subvencias 8 bibliotekojn

La Fondaĵo "Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich", kies celo estas subteni kaj pliriĉigi la kolektojn de Esperanto-bibliotekoj, asignis subvenciojn - uzablajn por akiri librojn aŭ aliajn varojn [...]

N-ro 707 (2017-10-02)

UEA pledas por ne-perforto

Hodiaŭ, la 2-an de oktobro, Unuiĝintaj Nacioj invitas la mondon kunsoleni la Internacian Tagon de Ne-perforto. La Tago celas disvastigi konscion pri la ne-perforta vojo al solvado de konfliktoj, inspirite de la filozofio kaj persona ekzemplo de Mahatmo Gandhi, kiu [...]

N-ro 705 (2017-09-26)

Malferma Tago la 25-a de novembro

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas por la 47-a fojo al la Malferma Tago, kiu okazos sabaton la 25-an de novembro 2017. Tuj poste, dimanĉon la 26-an de novembro, okazos seminario pri informado. La 48-a Malferma Tago estos la 28-a de aprilo 2018. [...]

N-ro 704 (2017-09-25)

UEA invitas prelegi en la IKU-sesio en Lisbono

Kadre de la 103-a UK en Lisbono okazos la 71-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas profesorojn, docentojn kaj personojn kun similaj kvalifikoj sendi proponojn pri prelegoj al la sekretario de IKU rete (amri@huji.ac.il) aŭ paperpoŝte: prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-7179901 Modiin, Israelo. [...]

TEJO



Reprezentu TEJOn en la Forumo Junulara Eŭropa

en Strasburgo

Ĉu vi estas juna eŭropano, entuziasmas pri politiko Eŭrop-nivele kaj dezirus reprezenti Esperanton kaj TEJO-n en la Eŭropa Parlamento, kie estos aliaj 8000 junuloj el la tuta kontinento? EYE 2018 estas la perfekta evento por vi! Junaj, entuziasmaj kandidatoj estas serĉataj por partopreni la plej grandan aranĝon de la Forumo Junulara Eŭropa, EYE, kiu okazos [...]

Invitu IJK 2019 al via lando!

Invitu IJK 2019 al via lando! Kandidatiĝu kaj organizu kune kun TEJO la 75-an Internacian Junularan Kongreson en via lando! Por ke kandidatoj sentu sin pli certaj kaj kuraĝaj ni proponas du etapojn por sendi al ni viajn proponojn. Kial ni faras tiel? Ĉar ni rimarkis ke kelkfoje vi bezonas pli da helpo pri viaj [...]

Partoprenu senpage la 103-an Universalan Kongreson en Lisbono 2018

Gazetara Komunikado de UEA SUBTENEblo POR PARTOPRENI LA UK-ON EN LISBONO Danke al malavaraj donacintoj al Fondaĵo Partoprenu UK-on, UEA havas la eblon subteni la aliĝkotizon de kelkaj kongresanoj dum la Universala Kongreso en Lisbono, en kelkaj kazoj ankaŭ la manĝo- kaj loĝadkostojn en la plej malaltaj kategorioj kaj en esceptaj kazoj la vojaĝkostojn. Homoj [...]

Leterojn ni ricevis el geamikoj




Varman saluton, kara samideano. Dankon kaj gratulon pro la sendaĵo de la revuo Turka Stelo, ĝi vere estas tre grava, bela kaj interesa.



Evandro Caboclo, el Brazilo

“Se ni ne rakontas ke Esperanto ekzistas, ĝi vere ne plu ekzistos. La estonto de nia bela kaj efika internacia lingvo dependas de ĉiu esperantisto. Pro tio ni devas ĝin diskonigi multe pli...”



POEMO POR LA MONDO

Evandro Caboclo

- Pensu pri homaro
- Kiel familio
- Preĝu ĉiutage
- Al nia bona Dio
- Pensu pri fremdulo
- Kiel nia frato
- Pensu en tuta mondo
- Kiel nia patrujo
- Preĝu por la homoj
- Kiuj ne havas amon
- Zorgu la infanon
- Kiu restas sur la strato
- Fariĝu voluntulo
- Por iu nobla idealo
- Preĝu kaj laboru
- Por pli bona mondo



EU finncos studon pri Esperanto

Ĉu vere studoj de Esperanto faciligas lernadon de aliaj lingvoj? Tion esploros nova projekto kun la nomo "Lingva Akcelilo", kiun finncas Eŭropa Unio.

La kroata nacia agentejo de la EU-fondaĵo Erasmus + decidis subteni per proksimume 250.000 eŭroj la projekton Lingva Akcelilo, en kiu kunlaboros naŭ partneroj el Slovenio, Slovakio, Kroatio, Bulgario, Germanio kaj Danio. Inter la partneroj estas du universitatoj kaj kvar lernejoj.

Laŭ informoj de Zlatko Tišljar, unu el la ĉefaj motoroj de la iniciato, la projekto estos realigata ekde novembro 2017 kaj daŭros ĝis decembro 2019. Ĝia ĉefa partnero estas la kroatia eldonejo Izvori, kiu jam eldonis kelkdek Esperanto-librojn. Partoprenos ankaŭ Inter-kulturo en Slovenio kun sia sperto pri la Zagreba metodo instrui Esperanton kaj la organizaĵo E@I.

– Temas pri projekto kiu kreas instrurimedojn (didaktikaĵojn) por instruistoj kiuj gvidos en lernejoj kurson Lingva Akcelilo, kiu poste esence plirapidigos la lernadon de dua aŭ tria fremdlingvo. La projekto antaŭvidas kurson por infanoj 7-8-jaraj kiuj scias skribi kaj legi, sed nenion pri lingvaj reguloj kaj gramatiko, klarigas Zlatko Tišljar.

Gravaj partneroj kompreneble estas la du universitatoj – Universitato de Maribor en Slovenio kaj Suddana universitato en Odense. La kvar

partoprenontaj elementaj lernejoj troviĝas en Slovenio, Kroatio, Slovakio kaj Bulgario. Inter la partneroj estas ankaŭ Studio Gaus el Berlino, kiu okupiĝos pri retaj solvoj.

La celo de la projekto estas ellabori instrumentodon, kiu tra tre baza Esperanto helpas infanojn ekhavi komprenon pri la elementaj strukturoj de lingvoj. Samtempe la infanoj efektive ekparolu kaj ekuzu Esperanton sur minimuma nivelo, por povi komuniki kun lernantoj en aliaj landoj.

La metodo uzos nur 250 radikojn, kiuj laŭ Zlatko Tišljar sufiĉas por kompreni 90 procentojn el ordinaraj tekstoj. Tian minimuman Esperanton laŭplane lernos infanoj en la 2-a aŭ 3-a klaso de elementa lernejo.

Por la instruado oni laŭplane uzos la unuajn ses lecionojn en jam ekzistanta retejo (<http://learn.esperanto.com/>), kiu sekvas la Zagreban metodon. La unua eksperimento okazos en kvar elementaj lernejoj, kie grupo da infanoj dum du monatoj trairos la unuajn du lecionojn.



el Libera Folio



Zlatko Tišljariĉo. Foto: Ziko van Dijk CC BY-SA 3.0

Simila projekto estis proponita al la kroata nacia agentejo jam pli frue, sed tiufoje ĝi estis malaprobata, rakontas Zlatko Tišljariĉo.

– Baze de mia laboro pri kurso bazita je plej ofte uzataj morfemoj la projekton finformulis profesie por la konkurso Maja Tišljariĉo kaj Maja Cimerman. Ĝi estis transdonita al la kroata nacia agentejo de Erasmus+ en 2015, sed estis malaprobata. Poste oni plibonigis ĝin, kaj ĝi estis refoje transdonita kaj aprobata, pro bona kvalito kaj bone difinitaj celoj kongruaj kun eŭropaj edukceloj.

Laŭ la espero de Zlatko Tišljariĉo, la eksperimento montros, ke la fremda lingvo kiun la infanoj ekstudos en la 3-a klaso de la elementa lernejo tiam montriĝos je 30 procentoj pli rapide lernebla.

– Nun ni devas realigi ĉion kio estas antaŭvidita en

la nuna projekto. Temas pri metodaro kaj instrukciaro, kiu ebligas ke la kurso Lingva Akcelilo povos gvidi iu ajn nekonanto de Esperanto post nur kelktaga seminario. La eksperimentaj 2-monataj kursoj pri la unua triono de la kurso devas testi kiom tiu scio jam influas al infana kompreno de bazaj lingvaj reguloj.

La nun aprobata projekto okazos inter novembro 2017 kaj decembro 2019. Poste eblis fari pli ampleksan projekton en dek aŭ pli da eŭropaj lernejoj, se la daŭrigo same ricevos subtenon de la fondaĵo Erasmus+, planas Zlatko Tišljariĉo.

Libera Folio: Kian publikan atenton ĝis nun ricevis la afero?

– Publika atento ĝis nun ne estis, ĉar ni mem ne volis reklami la aferon. Ni ne ŝatus ke la esperantistoj tro substreku la esperantistajn celojn. Ja oni aprobis monon por antaŭenigi la lerneajn celojn, ne por enkonduki Esperanton en la lernejojn, kvankam tio estas kroma efiko.

Fonto: <http://www.liberafolio.org/2017/09/26/eu-financos-studon-pri-esperanto/>

Je la memoro de D-ino Marjorie Boulton (07/05/1924 – 30/08/2017)

sendis Muhammad Naeem Javaid, el Pakistano

Ĝi estis la ora tago de mia vivo, kiam en la jaro 1995, mi renkontis D-rinon Marjorie Boulton. Kvankam unuafoje mi renkontis ŝin en la Brita Nacia Kongreso de Esperanto en Londono, tiam ŝi estis tro okupita, do ni interkonsentis



renkontiĝi denove en ŝia urbo Oksfordo. Hazarde mia amiko S-ro Parvaz venis al Londono el Kanado kaj li ankaŭ volis havi la ŝancon viziti tiun Pioniron de Esperanto kaj Esperanto-movado. La letero, kiu venis al mi de D-ino Boulton, rilate al nia vizito al ŝi kaj la urbo Oksfordo estis tre grava por mi ĉar ĝi estis kvazaŭ ekzemplo de literaturo, ĉiu vorto estis plena je ŝia profunda amo, toleremo kaj sincereco. Ŝi tre bone klarigis de kie ni prenu la buson kaj kie ni elbusiĝu en Oksfordo dum voje antaŭ ol la busa terminalo. kaj laŭ ŝiaj gvidoj ni tre facile atingis ŝian hejmon.

Do, ni prenis la buson de Viktoria Stacidomo en Londono, la tre granda, tro okupita Stacidomo de kie trajnoj, metroo kaj busoj forveturas al ĉiuj partoj de

Britio kaj al ĉiuj gravaj urboj de Eŭropo.

Tre proksime al Viktoria Stacidomo estas la busa terminalo, kiun vi povas atingi perpiede. La buso estis luksa kaj plena je studentoj, turistoj kaj lokanoj. Post unu kaj duon-hora veturado ni atingis Oksfordon kaj laŭ ŝia bonega gvido ni tre facile atingis ŝian hejmon. Ŝi loĝis en "CATTE" Strato kaj ŝi poste diris al ni ke laŭ la antikva literatura lingvo "CATTE" signifas "KATO". Ĉiuj esperantistoj scias, ke ŝi estis grandaKATO-AMANTINO.... Ŝi klarigis en sia letero ke ŝi havas tri katojn en sia hejmo kaj petis antaŭ-pardonon se ili ĝenus nin. Do por ni estis bela surprizo, ke ŝia loĝejo fakte estis ĉe "KATO-STRATO". Ŝi estis preta por bonvenigi nin tre varme kaj kun sinceraj kaj bonaj deziroj.



Ŝi tre bone gastis nin en sia hejmo kaj traktis nin kiel ege bonkora gastigantino plibone estus,



D-rino Marjorie Boulton

se mi dirus kiel zorgema patrino. Ŝi klarigis al ni ke ĉirkaŭ ŝia kvartalo loĝas multaj islamanoj kaj ke ŝi havis bonegajn rilatojn kun ili kajke ŝi ofte aĉetas viandon el Islama Vendejo, do ni ne timu se ni devus manĝi viandon kuirita de ŝi, ĉar ĝi estus pura ni. Ŝi tre bone konis ke Islamo havas alian manieron por la buĉado de bestoj.



D-rino Marjorie Boulton en sia hejmo antaŭ la biblioteko

Ŝi survestis nigran robon kaj ni vizitis kune la mondfaman Universitaton de Oksfordo. Tiu universitato donis al la mondon la plej valorajn, famajn kaj grandajn Sciencistojn, Filozofojn, Mastrojn de diversaj religioj, Ekonomiistojn, Politikajn Sciencistojn kaj homojn en multaj aliaj fakoj. Ŝi montris al ni la tutan universitaton de Oksfordo, ĉie troviĝis siaj studentoj kiuj jam estis profesoroj en la sama universitato. La atmosfero de universitato estis ege bela oni povis vidi tie la studentojn kiuj venis el ĉiuj partoj de la mondo por studi. Vere tiu etoso estis INTERNACIA kaj kompreneble tiaj universitatoj certe bezonas Esperanton kiel komunan lingvon. Poste ŝi gvidis nin tra la urbo kaj montris al ni la plej gravaj kaj belaj partoj de ĝi. Ŝi tre bone klarigis la lokojn kaj la vidindaĵojn, ĝiajn historion rilate al famaj kolegioj, konstruaĵoj, parkoj kaj monumentoj.

Posttagmeze ni revenis al ŝia hejmo kaj ŝi montris siajn verkojn kaj la bibliotekon kiu havis tre riĉan kolekton de Esperanto kaj Angla literaturo kaj librojn pri diversaj temoj. Ŝi havis tri katojn la plejmaljuna inter ili nomiĝis AFRO kiu estis kun ŝi dum la lastaj 13 jaroj. La alia estis AGATA kaj la tria estis el Asamo kies nomon mi jam forgesis. En iu angulo de ŝia ĉambro estis bela ŝranko en kiu ŝi metis multajn donacitajn figurojn de katoj kaj multajn bildkartojn, kiujn ŝi ricevis de diversaj geamikoj kaj el diversaj landoj. Pro la profunda amo al katoj ŝi estis dum viva perzidanto de la grupo "KAT-AMIKARO". Dum nis babilado ŝi ankaŭ diris ke Profeto Mohammad (Benita

de Allaho) ankaŭ tre ŝatis katojn kaj ŝi ankaŭ diris ke ŝi jam legis la tradukon de la Nobla Korano, la snakta libro de islamanoj.

Ŝi neniam edziniĝis kaj pasis sian tutan vivon sole kaj dediĉis sian tutan vivon al la antaŭenigo de la Esperanto-movado. Ŝi verkis multajn librojn kaj Esperante kaj Angle sed ŝi famiĝis pro siaj ege belaj libroj verkitaj en lingvo Esperanto. Unu el la plej legataj libroj de ŝi estas "FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ". Ŝi verkis poemojn, dramojn kaj fikciojn. Ŝiaj tradukaĵoj ankaŭ estas allogaj por la Esperantistaro. Pro ŝia valora laboro pri literaturo, toleremo kaj amo por la homaro, iam ŝi estis unu el la kandidatoj de NOBEL-PREMIO.

Ni pasis ege bonan tempon kun ŝi en ŝia hejmo, kiu ne nur estis hejmo sed iu valora instituto de kie oni povas lerni multajn aferojn, kaj ŝi informis nin pri ŝiaj belaj memoroj kaj klopodoaj rilate al Esperanto. Ŝi donacis al mi kelkajn bildkartojn kaj la libron "CENT GXOJ-KANTOJ" verkitan de ŝi.

Mi tre ege bedaŭras ke ŝi forlasis la materian mondon en la aĝo de 93. Nun ŝi ne plu estas inter ni sed ŝiaj memoroj ĉiam restos en niaj koroj, ĉar ŝi estis TREZORO por Esperanto kaj Angla literaturo.

Tiaj homoj neniam mortas ili vivas por ĉiam en sia verkaro, amikaro kaj amantaro.....

**Muhammad Naeem Javaid
Lahore-Pakistano**



Maldekstre s-ro Parvaz, en la mezo d-rino Marjorie Boulton kaj mi en la dekstra

Agnostikisma Pasko

Irante nun malsupren post la mezo de la vojo,
kun koro finrompita, post larĝa malsukces',
mi sentas pri la morto specon de nuba ĝojo;
venos la klara Neo post manĝ' de klara Jes.

La nokto min invitas, seneco kaj malviglo,
silento de marfundo, kie ne povas ŝtormi;
min logas la vokado de la velura nigro:
ĉion demeti baldaŭ! dormi, eterne dormi!

Ĉesos doloro ĉia ĉesos dolorotimo,
post lastaj humiliĝoj ne humiliĝi plu;
ho, ĉeso, bona ĉeso! halto de karna ŝlimo!
ho digno, kaj silento, kaj trankvilo de vaku'!

Ĉesos la mon - sklavigo de la stomak – bezono;
ĉesos la krucumado de la pelad' libida;
ĉesos la am – soifo, ĉesos soif' al bono,
ĉesos dilemoj ĉiaj, devaro viv – divida.

Konsolas, kvietigas, la penso pri perejo;
demeto, kaj transdono, kaj senkonscio paca;
belas la blinda nigro, la lasta, vasta Neo,
demeto kaj dormado, kaj nokto por la laca.

Sed dum mi memkompate rigardas malkoloron,
ekvidas mi tremadon, ekflaras rozparfumon;
preter la densa nigro mi vidas ian oron,
kaj meze de mallumo nekompreneblan lumon.

Memoras mi, memoras, la oron de la memo,
vualon lum – tremantan malofte perceptitan,
kiam ĉe hom' malforta tiu vualotremo
sugestas transan lumon, la lumon infinitan.

Meze de bagateloj, vantemo kaj banalo,
ekmontris sin kelkfoje aludo alimonda,
plej grave en la vivo trembrilis la vualo,
fikcia interspaco el superlumo onda.

Mi foje ĝin ekkonis en brakoj de amato,
iam, soleca, laca, sur angla montosupro;
ĉe agoj de la kreo, ĉe agoj de kompatado,
en unu sunsubiro kun nub' el flama kupro.

Momentoj mortofortaj! momentoj de intuoj!
la vivo forkribriĝas, jam povoj ekforfalas;
silentas jam alaŭdoj, ekkriĉas la noktuoj,
sed nokte la vualo trembrilas kaj opalas.

sendis Lenke Szász, el Rumanio

Kaj kiam mia sango kotigiĝos sur la strato,
aŭ ŝvito malsekigos mian finkuŝan liton,
eble momente, kiel en brakoj de amato,
vualo lumtremanta plenigos tutan vidon.

Kaj kiam timo ĉesos, sopir', doloro, honto,
kaj ĉe okuloj korpaj la granda Neo nigros,
eble la vera Mio pretiĝos por Renkonto,
vualon lumtremantan finfine mi disigos.

Eble – la ekkompreno, la scio, la splendoro!
la vastoj kaj la celoj, kie la am' pardonos;
kiel sur ter' simbola, la vera pasifloro;
kaj kiel jam konata, Konanton mi ekkonos.

Preter putrantaj ĉeloj kaj paradoksa ploro,
kaj longaj densaj ombroj de taksuso kaj cipres',
la ŝajna nokto malos, trembrilos la aŭroro,
kaj post la granda Neo lumos eterna Jes.

poemo de Marjorie Boulton (1924 – 2017)

Jel la 09-a de oktobro okazis la entombigo de Marjorie Boulton. Mi sendas ĉi tiun ŝian poemon al miaj geamikoj. Faru la samon, se vi konsentas, tiel ni alportas floron al ŝia tombo, simbole. Tiu poemo de Marjorie Boulton troviĝas en la volumo "Du el", eldonita en 1985. **Lenke Szász**



Fondita en 1997 kadre de la Lingvistika Instituto (Fakultato pri Moderna Filologio) de UAM (Universitato Adam Mickiewicz, Poznań) la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj startigis sian unuan grupon en 1998 kaj daŭre ĉiun trian jaron la sekvan. Nun, post 20 jaroj startis la sepa interlingvistika grupo kun 21 partoprenantoj el 12 landoj (Ĉinio, Koreio, Turkio, Brazilo, Usono, Francio,



Başak Aray, aliĝinto el Turkio

Svislando, Germanio, Hispanio, Ruslando, Kazaĥstano kaj Pollando). **La unuan fojon aliĝis studentoj el Ĉinio, Koreio kaj Turkio, kio certigas pli grandan multkulturecon.** La fondajo ESF (Esperantic Studies Foundation) jam de 15 jaroj disponigas kelkajn stipendiojn por la studentoj, kio ebligas pli grandnombran partoprenon en la studoj.

La kursoj havis riĉan programon de la 16a ĝis la 20a de septembro: prof. Humphrey Tonkin gvidis la kurson pri esperanta kulturo prezentante ĝin en vasta historia fono; kontribuis prof. Aleksander Melnikov pri rilatoj inter lingvo kaj kulturo kaj pri personeco de esperantisto; krome d-ro Jukka Pietiläinen pri esperantaj revuoj. Same Humphrey Tonkin enkondukis la esperantan literaturon de la unua periodo koncentriĝante pri la poezio, sekvis lin Tomasz Chmielik kun la prozo de tiu epoko. Eblas aliri fonetikon samtempe interese kaj serioze – tion pruvis prof. Nicolau Dols Salas per sia kurso. Interlingvistiko (en pli malvasta senco) konsistigis la kurson de prof. Věra Barandovská-Frank, kiu jam povis uzi la proveldonon de sia universitata lernolibro pri interlingvistiko. Tiu ĝojiga evento malfermas la serion de lernolibroj de la Studoj fontante el la 20-jara sperto.

La malnova grupo kiu startis kiel rekorde granda, ankaŭ fine restis rekorda, ja 11 gestudentoj plenumis sian finekzamenon kun defendo de sia faklaboraĵo el la terenoj de lingvistiko (Karina Oliveira el Brazilo, Bengt Olof Aradson el Svedio kaj Arina Osipova el Ruslando), de interlingvistiko (Ida Stria kaj Michał Kozicki el Pollando), el lingvopedagogio (Felix Jimenez Lobo el Hispanio kaj André Staes el Belgio), de komunikado (Johan Derks el Nederlando/Serbio) kaj de literaturo (Rafael Zerbetto el Brazilo/Ĉinio, Fernando Pita el Brazilo kaj Xesus Moifios Pardavila el Hispanio), aldone kiel la dek-dua Paweł Fischer-Kotowski el la antaŭa grupo.

Kiel kutime, la lingvopedagogia specialiĝo de la tria jaro konsistigas la instruistan trejnadon al kiu eblas

aparte aliĝi kaj ricevi la instruistan diplomon de ILEI. Ĉi-foje tri partoprenantoj el Pollando (Krystyna Worobiej, Markéta Wilkus kaj Mariusz Hebdziński) kaj unu franco (Jean-Claude Roy) akiris ĝin post prezento de finlaboraĵo kaj kompleksa ekzameno.

La interlingvistikan sesion kompletigis la 4a Interlingvistika Simpozio (21-22 sep 2017) kun la temo: “Rolo de internaciaj lingvoj ekde la epoko de Zamenhof ĝis la nuntempa multkultura mondo” kun la celoj festi la Zamenhof-jaron kaj la 20-jariĝon de la Studoj. Ĝi estis malfermita por granda publiko kun la oficialaj lingvoj: esperanto, angla kaj pola. Ĉirkaŭ okdek partoprenantoj el diversaj landoj traktis lingvopolitikon, planlingvojn kaj lingvistikon, literaturon, movadon kaj instruadon de esperanto en paralelaj sekcioj dum du tagoj, entute okazis 50 prelegoj.

Jaŭde por la malfermo la rektoro de UAM, prof. Andrzej Lesicki sendis gratulleteron; persone esprimis sian altan taksadon por la 20 jaroj de la Interlingvistikaj Studoj prof. Maciej Karpiński, vicdekano de la Fakultato pri Moderna Filologio; Stefan Mac-Gill salutis la simpozion en la nomo de UEA. La unua ĉefprelego – Humphrey Tonkin: Esperanto: A Language Policy Assessment (Esperanto: lingvopolitika taksado) – estis malfermita por kolegoj de la Lingvistika Instituto. Věra Barandovská-Frank parolis kiel la dua pri la tereno de interlingvistiko kaj prezentis la proveldonon de sia libro pri interlingvistiko. Vendrede same okazis du ĉefprelegoj: Ilona Koutny, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj skizis la 20-jaran historion de la Studoj ligante ĝin al la 50-jara historio de la universitata instruado de esperantologio kaj interlingvistiko, kiu komenciĝis per la Esperanto-fako de Budapeŝta Universitato en 1966. Sabine Fiedler per amuzaj ekzemploj ilustris kiel funkcias ŝercoj en esperanto.

Semajnfine la kunesto daŭris dum la tradicia kultura festivalo Arkones, kun prelegoj, muziko, filmoj.

Ilona Koutny

Fonto:

La Ondo de Esperanto, 2017, № 10, pp.11-12.



Rolando Toro Araneda, 1924-2010, estis ĉilia antropologo kaj menskuracisto, iniciatinto de la Biodanza ("danco de la vivo"), teoria kaj



praktika sistemo kiu celas la liberan esprimon de emocioj, identeco kaj integriĝo inter la partoprenantoj, pere de ekzercoj de dancado,

voĉesprimo, kontakto kaj gestumado). Multajn jarojn li prezidis la Internacian Fondaĵon pri Biodanco. Jen elĉerpaĵoj el lia intervjuo libro «la viro, kiu parolas kun la rozoj»

tradukis Roland Platteau

«Mi opinias, ke pri ĉio, kio estas bona, elstara, kiel amo, amikeco, rigardado de naturo, arto, oni devas esti troe, eksterordinare troe.»

«Mia patrino donis al mi malavare sian amon kaj sian permeson, ŝi ĉiam fidis min, de kiam mi estis tute malgranda.»

«Koncerne mia patro, li vivis en la reva mondo ; neniom da rilato kun la realismo miapatrina (la nutrado, la lernejo, la vestoj). Mia patro ludis muzikon, mandolinon, elspezadis sian tutan monon por aĉeti al ni ludilojn, anstataŭ zorgi pri la urĝaĵoj kaj necesajĵoj.»

«La psikologiisto prezentis al mi tabelon el pli ol cent aktivecoj, kaj ĉiuj plaĉis al mi ! muziko, matematiko, gimnastiko, literaturo, poezio, vojaĝoj, mi ŝatis ĉion !»

«Mi opinias, ke la mondo ofertas al ni tiom da interesigaj kaj ravaj aĵoj, ke estas alloga eniri en ili.» Kiel patro mi atingis la konkludon, ke en patreco konsistas unu el la plej magiaj latentajĵoj, kiujn viro povas disvolviĝi, la spertado de patreco.»

«Mi kredas je la familio, je la aparteno al iu ekologia nesto, kaj al mi tre plaĉas la geedziĝeco.

«Mi unue studadis la diversajn ekzistantajn psikoterapimetojn, sed mi jam vidis, ke neniu sukcesis eniri en la animon da la malsanulo ; ili nur tuŝetis ties konduton. Mi ne kredas je la konduktaj terapioj.»

«De post tio, mi estis dotita de preskribo : por la mensmalsanuloj tio, kio konvenas, estis la feliĉigaj muzikoj. Sed io ankoraŭ mankis ; car mi vidadis, ke ili spertis grandan bezonon pri korvarmo.»

«... Estis unu malsanulo, kiu profitis la permeson kreitan pro tiu situacio, kaj kiu staradis apud malsanulino, skizofreniulino, ambaŭ tenantaj sin per la

manoj. Kaj ili restis mergantaj en ekstazo dum la unu horo kaj duono, kiun daŭris la seancon, ne elirantaj el tiu stato, ĉar ili estis aliloke : tio estas ke ili vivadis la amon senliman.»

«La fiaskeco de mensmedicino kuŝas laŭ mi en la nekapablo de la kuracisto ami la frenezulon.»

«La "pozitiva kritiko" neniam ebligis neniun pliboniĝi ! Tio, kion farendas, estas labori sur la sana parto, kaj stimuli la latencojn, kiuj estas propraj al la unuopulo. Tiu edukado, bazata sur la kritiko, subkompreninta, ke ni posedas ciujn fadenojn de la saĝo, profunde malplaĉas al mi.»

«Freŭd estas elstarulo, tamen lia metodo ne interesas min, ĉar la korpo ne ĉeestas en ĝi.»

«La komprenaĵo "kolektiva nekonscio" konsistas laŭ mi grandan malkovron. Tio, kion mi ne aprezas ĉe Jung tamen estas la teorio pri serĉado al la Mio, kiu estas fakte vojo al memrego, kiu celas transformi la homon en iaspecan reĝon aŭtokratan kaj ne en fraton.»



«Mem Freŭd, kiu opiniis, ke se la nekonsciaj konfliktoj transiros al la konscio, la stato de la persono pliboniĝos. Neniam ! (li ardiĝas) Neniu neniam pliboniĝas konsciiĝanta pri siaj malvirtoj kaj problemoj.»

«Feldenkrais iam diris al mi, ke li konsciiĝis, ke tio, kion la korpo bezonas, estas karesojn, ne konscion. Kaj tiam mi eldiris mian plej amatan frazon : "oni devas agi du fojojn antaŭ ol pensi" !»

«De Reich mi konservis la gravon de la sekseco sentima, la gravo de la seksa liberiĝo. Ĉar la seksa liberiĝo ne jam komencis !»

«La Biodanza estas ia utopio, kio realigeblas, kaj kiu realigeblas, ĉar ĝi kreskas tiomamaniere, ke ĝi estas eskapanta el niaj manoj. La Biodanza prosperas ĉie, ĉar ĝi estas tio, kion la homa estaĵo bezonas.

«Mi opinias, ke amo estas esence sento pri



aparteno. Ne temas pri masklisma komprenaĵo de aparteno, en kiu la viro posedus virinon, mem restante libera. Nek, ne pli, komprenaĵo virinisma, en kiu la virino estus libera, kovante malamon al la viro.»

«Ni ne esprimas nin. Nur la infanoj plu kapablas esprimi ĉion.»

«Laŭ mi poezio estas mia percepto ĉiutaga de la ĉiutagaĵo. Ĉe mi ĉio havas kunsenton poezian.»

«Vivo devenas de impulso, kiu venas de antaŭ la vivo, kaj kiu pelas la kosmon evolui al konscio, al amo al kunsentemo, kaj al ĉio, kio konsistigas la grandon de la homo.»

«La leĝoj ne estas fundamentitaj surbaze de rajto al la vivo, de respekto al la vivo, de respekto al la homaj rilatoj, sed surbaze de la rajto de proprieto.»

«Hodiaŭ la mizero estas ĉiea, dum la tuta mono kaj la tuta povo sidas en la manoj de eteta elito. Tiu elito defendas tiun povon kaj monon je la prezo de l'sango.»

Estas morala dekadenco en tiu kulturo. Kaj tio povas ŝanĝi nur sur bazo de la infana korsentemo, de la raviĝo senti sin vivanta, de la vivĝojo, de la poezio pri renkonto, de la dancado, de la seksa ĝuo.»

«La buddaisma religio ebligas eniri en kontempladan serenon, krei enen malplenon, en senigo de deziro, anestezianta la sentumojn, kaj atinganta perfektan solecon. Tiu propono hirtigas min,

mi taksas ĝin abomeninda ! kaj tamen ĝi ĝuas pri vasta prestiĝo.»

«La orientazia solipsismo, kiu malhelpas al vi senti deziron por la aliulo, senti entuziasmon por la aliulo. Ĉar viaj sentumoj devas esti anesteziitaj, kaj vi devas plenigi vin de granda malpleno, por aliri al ekstazo kun la kosmo. Sed la ekstazo kun la personoj, la ekstazo, kiun vi travivas, kiam vi havas infanon inter la brakoj, la ekstazo, kiu vi spertas kun la virino, kiun vi amas, jen tio estas la ekstazo !»

«Amo estas nenio alia ol la ĝojo rilati kun la aliulo kaj la deziro kovi tiun ĝojon»

«Tiu ligo kun la patrino pludaŭras trans la morto de tiu ĉi, tio estas umbilika ŝnuro, kiu neniam rompiĝas, je la granda malespero de la psikologiistoj, kiuj asertas, ke endas fortranĉi la ŝnuron. Ne endas fortranĉi la ŝnuron, tutsimple ĉar ĝi ne estas fortranĉebla.»



post longa, vana serĉado, atingis insulon de la Egea Maro (Αιγαίον), haltis kaj restis tie, doninte sian nomon al la insulo. Tiu insulo, unu el la belegaj Cikladoj (Κυκλάδες), nuntempe mondkonata, kun sia nova nomo Santorino (Σαντορίνη), estas unu el la plej belaj lokoj de la mondo, unu el la plej allogaj turismaj paradizoj.


En la tuta Helenujo kaj la cetera antikva mondo, Eŭropa estis adorata kiel diino. Pri ŝia deveno, forrabo kaj tuta sorto estis kreitaj multaj mitoj kaj diversaj versioj de ĉiu mito.

Kelkaj diris, ke la Helenoj donis la nomon de la diino al la kontinento pro tio, ke ties loĝantoj estas blankhaŭtaj kiel Eŭropa. Aliaj diris, ke tio okazis ĉar la Helenoj, kiuj ne konis la okcidentajn kaj nordajn ekstremaĵojn de la kontinento, kredis ke ĝi estas vere enorma. Tiel, ili donis al la kontinento la nomon de Eŭropa, elvenanta el la vorto "eŭropia" (εὐρωπία), kiu signifas tre larĝa, ege etendiĝanta areo.

Do, de Eŭropa venis Eŭropo kaj rigardante nun la ĝeneralan bildon de nia kontinento, ĉion kion ĝi oferis al la mondo per senfinaj militoj, interbataloj, konfliktoj, dividoj, sennombraj barbaraĵoj, sed ankaŭ per gravaj civilizaciaj fruktoj, sciencaj atingoj k.a., mi komparas kaj mi haltas je tio, ke de Eŭropa venis netaksebla

utilo en la homaro. Estis unue tiu eksterordinara virina beleco, estis malmodere arda dia amo, estis unikaj herooj, diaj postmortaj juĝantoj, estis novaj gloraj landoj, regnoj kaj urboj, estis multo, fine estis Santorino, kiu, metata sur la unu taso, por cedi al ekvilbrigo de la pesilo postulas, laŭ miaj propraj kalkuloj multon el Eŭropo.

Tamen, por esti justa, ne kiel Minoo kaj Radamantiso, sed simple, home justa, mi diru, ke parolante pri Eŭropo mia penso flugas ne nur al sinjorino Merkel sed ankaŭ al sinjorino Monika Beluĉi, kaj aliaj konsolaj belajoj!



<<<<<<

Multajn jarmilojn antaŭ la Eŭropa Unio, la Eŭropa Komunumo, Parlamento, Konsilio, Komisiono, Banko kaj ĉio alia, estis, kiel sciante, Helenujo, kun siaj interesaj kaj allogaj mitoj, kun multaj dioj kaj diaĵoj, inter kiuj estis heroino kaj dfiino nomata Eŭropa.

Tiu Eŭropa estis filino de ege nobla gento, ne nur ĉar ŝi estis reĝidino, sed precipe ĉar ŝi estis nepino de la granda mara dio Pozidono (Ποσειδών). Fakte, la patro de Eŭropa, Agenoro (Αγήνωρ) estis unu el la multaj filoj de la granda dio, naskita de alia reĝidino, Libia (Λιβύη).



Nuntempe, la penso de tiu, kiu parolas pri Eŭropo, kuras rekte al la figuro de la potenca sinjorino Merkel, tamen tiu malnova Eŭropa estis eksterordinare bela junulino, kaj pro tio ŝi vivis tre strikte protektata, sub la sendorma atento de sia severa patro, sed ankaŭ de siaj tri bravaj fratoj. Do, neniu viro povis alproksimiĝi al ŝi kaj libere ŝin rigardi.

Tamen, nenio povis malhelpi la reĝon de la dioj, Zeŭson (Ζεὺς), kiu, kiel sciante, estis ne nur mastro de la mondo, sed viro ekstreme virinama, tute senbrida en siaj tre oftaj amoraj eksplodoj.

Zeŭso, kiu, kompreneble povis ĉion vidi kaj scii, ekde kiam la junulino viriniĝis, la unua konstatis kiom bela ŝi estas, do, post nelonge, li arde enamiĝis al ŝi kaj pasie deziregis ŝin akiri. Tamen, li ne povis fari tion malkaŝe, ne nur ĉar la junulino estis bone gardata, sed ankaŭ ĉar Hera (Ἥρα), lia tre ĵaluza edzino estis ege atentema.

La ruza direĝo, kiu ĉiam trafe sukcesis trompi pri tiaj aferoj sian edzinon, unu matenon, kiam la bela Eŭropa amuziĝis, ludante kaj dancante kun siaj kunulinoj en apudmara loko de Sidono (Σιδών), transformiĝis en belegan blankan taŭron kaj trankvile alproksimiĝis al la junulinoj. Tiuj lastaj, vidinte ke la bela besto estas tute malsovaĝa, kuraĝigante unu la

alian, alproksimiĝis al ŝi kaj komencis ĝin karesi. Eŭropa, plena je admiro kaj amemo, kisadis la beston, kiu komencis leki ŝiajn piedojn kaj poste, kvazaŭ karese muĝante, genuiĝis antaŭ ŝi, kvazaŭ ŝi admonus ŝin rajdi sur ŝi. La junulino plenĝoje faris tion kaj tiam, la taŭro eksaltis kaj fulmrapide kuris kaj forflugis al la maro, forportante la belegan, senpovan Eŭropan.



La dio haltis en Kreto (Κρήτη) kaj tie li tre bone kaŝis sian amatinon, kompreneble li multe kaj longe ĝuis ŝin, tiel ke ŝi baldaŭ naskis liajn tri filojn, tri, vere brilajn figurojn de la mortema kaj la senmorta mondo. Estis Minoo (Μίνως), reĝo kaj leĝdonanto de Kreto, Radamantiso (Ραδάμανθους) kaj Sarpedono (Σαρπηδών). La du unuaj, pro sia superhoma justeco, post sia morto iĝis, laŭ decido de la dioj, juĝistoj de la mortintoj en la suba mondo, en Hadeso (Αἴδης) kaj la tria iĝis la ĝlora fondinto kaj reĝo de la granda, potenca regno, Licio (Λυκία), en la sudokcidenta Malgrandazio.

La potenca, tamen en tiu okazo senpova, patro de Eŭropa, treege malĝoja kaj kolera pro la forrabo de sia sola filino, ordonis siajn tri filojn, senhalte trakuri la tutan mondon por serĉi kaj trovi sian perditan fratinton. Li donis tiun ordonon aldoninte ke se ili ne trovos ŝin ili neniam povos reveni en la patrujon.

La tri junuloj longe vagadis kaj vane serĉadis en la tuta helena kaj barbara lando, ili ne povis trovi la bone kaŝitan Eŭropan. Ne plu povante reveni hejmen, decidis alilokiĝi, tiel, la unua, Kadmo (Κάδμος), iris al Beotujo (Βοιωτία), kie li fondis la potencan kaj tre gloran urbon-staton Tebo (Θήβαι), La du aliaj, Fenikso (Φοίνιξ) kaj Cilikso (Κίλιξ), iris al Azio (Ασία), kie ili fondis, la unua Fenicujon (Φοινίκη) kaj la dua Cilicion (Κιλικία), regnojn kun tre glora en la jarcentoj historio kaj civilizacio.

Kaj estis ne nur tio, ĉar unu ankoraŭ persono, Tero (Θήρος), onklo de Eŭropa, ankaŭ filo de Pozidono,



4. Kiel produkti dulingvan aŭ trilingvan infanon?

La unua fazo de la produktado estas la tradicia. Nenio aparta pri tio. Temas pri la bone konata sistemo de Adamo kaj Eva. Post tio la opinioj komencas varii. Kelkaj opinias, ke estas oportune paroli jam en pluraj lingvoj al la bebo en la patrina ventro je, ekzemple, 7 monatoj. Kelkaj aliaj pensas, ke tio ne estas bezonata aŭ ke la influo de tio estas minimuma. Ĉiokaze estas fakto, ke pluraj eksperimentoj montris, ke bebo al kiu oni regule legis difinitan fabelon dum li estis en la ventro de la patrino, rekonas tiun fabelon meze de aliaj fabeloj, kaj montras tion per tre pli rapida suĉado (tiel beboj signalas, kiam ili estas tre malgrandaj).

Ĉiokaze ni forgesu pri tio, kaj okupiĝu pri la momento, kiam la infano naskiĝas. Estas kelkaj grandaj pensolinioj pri kiel la gepatroj devas kondukti lingve ek de tiu momento. Ne atendu ekparoli, kiam la bebo estas pli granda kaj "komprenas". Beboj komprenegas tuj.

Unu persono - unu lingvo

De la unua momento la gepatroj ekparolu al la bebo en la lingvoj, kiujn ili volas, ke li parolu, ekzemple la patrino ruse kaj la patro Esperante, kaj ili daŭrigu tiun sistemon sen ŝanceliĝoj dum la tuta posta vivo. Ĉu pluvos, ĉu ventos, ĉu ĉeestas la bopatrino aŭ la kuracisto oni daŭre parolu al la infano en la "ĝusta" lingvo, kaj eventuale traduku por la aliaj ĉeestantoj, se estas grave, ke ili komprenu. Ekzemple: "Danku la avinon!/[kaj turniĝante al la avino] Di' grazie a nonna!"

Unu problemo, kiu ofte leviĝas ĉi-rilate estas la demando: kiu parolos al la bebo la lokan lingvon, la italan en la ekzemplo de miksitaj esperantista paro loĝanta en Italujo. La respondo estas simpla "Principe neni, ĉar tio ne estas bezonata." La loka lingvo, la itala en nia okazo, asertas sin mem, malgraŭ tio, ke la gepatroj eventuale ne volas. Estas tro da parolantoj de la itala, la geavoj kaj aliaj parencoj, la televido, la homoj en la strato, ktp. Simple ne estas eble vivi en Italujo kiel bebo kaj ne lerni la italan. Mi konis iam germanan-usonan familion, kiu provizore loĝis en Italujo, atendante reiri al Usono baldaŭ. Ili tute ne havis intereson, ke la infano lernu la italan. Ili parolis al ĝi (mi vere ne memroas la sekson de la infano) en la germana kaj en la angla. La unua vorto, kiun la infano diris estis "grazie!", kaj la gepatroj demandis sin kiel ĝi povus esti lerninta tiun vorton. Ĉiu plenkreska

italo kiu restis nur 10 tagojn en Sharm-el-shejk, kaj tute ne deziris lerni la araban, certe lernis almenaŭ unu vorton "Shukran" = "Dankon!" kaj eble ankoraŭ kelkajn aliajn. Rigardu ĉiujn infanojn de enmigrintaj familioj, en kiuj oni parolas hejme nur en la bangla (bangladeŝa, se vi volas). Ili tamen lernas la italan kaj ne aŭskultu konservemajn instruistinojn. Ili parolas ĝin same bone kaj kun la sama loka elparolo de la samaĝaj italaj infanoj. La problemoj apartenas nur al la infanoj, kiuj ĵus alvenis. Ankaŭ la plej granda lingvisto havus problemojn paroli en la mongola la tagon post la alveno al Ulanbataro.

Alia problemeto estas, ke la du gepatroj prefere devas kompreni ĉiujn lingvojn, kiujn la infano parolas. Tio ne estas devo absoluta, sed granda preferindaĵo, ĉar la konversacioj ĉirkaŭ la manĝotablo daŭre saltas de unu lingvo al la alia. Ekzemple: Patro al infano: "Ĉu vi bonvolos doni al mi la salon?", Patrino al infano: " (en la rusa) Dove hai nascosto il sale?", Avino al patrino "(en la rusa) Io ho il sale." ktp. Mi mem konis familion, en kiu la patro parolis al la infanoj itale kaj la patrino germane. Post iom da tempo la patro mem komencis viziti kurson pri la germana, por kompreni tion, kion la patrino diras al la infanoj, kaj kion ili respondas al ŝi.

Unu situacio - unu lingvo

Alia sistemo, kiu solvas kelkajn el la problemoj de la antaŭa metodo (kiu, cetere, estas la plej uzata) sed kreas aliajn problemojn estas tiu konata kiel "unu situacio - unu lingvo". Tio signifas, ke la lingvo varias, kiam varias la konkreta situacio. Ekzemple, kiam la infano estas hejme sola kun la patrino la lingvo estas la rusa. Kiam la patro revenas hejmen la lingvo fariĝas Esperanto, kiam la familio promenas ekster la domo, vizitas la italajn geavojn, ktp. la lingvo estas la itala. Evidente la lingvo iĝas la rusa kiam la familio vizitas la rusajn boparencojn.

La ĉefa problemo de ĉi tiu metodo estas, ke ĝi postulas ke kaj la patro kaj la patrino parolu relative bone ĉiujn koncernatajn lingvojn. En la antaŭa metodo "Unu persono - unu lingvo" vere sufiĉas, ke ĉiuj komprenu ĉiujn lingvojn (sed bone parolu unu el ili), sed en ĉi tiu metodo ĉiuj vere devas paroli ĉiujn lingvojn almenaŭ en akceptebla maniero.

Sed, se ĉiuj parolas ĉiuj lingvojn, la sistemo funkcias tre bone. En la familio de mortinta esperantisto el Kanado oni alternis inter la franca, la



angla kaj Esperanto. Kiam la infanoj estis jam grandaj oni faris familian ludon: unu el la familiano ekkantis la francan himnon kaj de tiu momento ĉiuj devis paroli france [se iu ne faris li devis pagi punon], kiam unu ekkantis "la espero", ĉiuj devis paroli en Esperanto, ktp.

Unu tempo - unu lingvo

Ankaŭ ĉi tiu sistemo, kiu unuarigarde ŝajnas iom stranga, donas bonajn rezultojn. Konata itala esperantlingva familio parolis matene en la itala kaj posttagmeze en Esperanto kun ege bonaj rezultoj. Komprenoble en la realo ĉiu familio devas adapti ĝin al sia situacio, sed ne estas malfacile imagi alteniĝon de ĉi tiu speco: en la labortagoj dum la tagaj horoj ĝis la momento, kiam la patro revenas hejmen, ĉiuj parolas itale, dum la vesperoj kaj la semajnfinoj, kiam la patro estas hejme, ĉiuj parolas Esperante. Ankaŭ ĉi tiu sistemo postulas ke ĉiuj membroj de la familio parolu ĉiujn lingvojn.

Sensisteme

Kiel vi rimarkis la sistemoj priparolitaj provas ligi la uzon de difinita lingvo al difinita homo aŭ situacio aŭ tempo. Tio faciligas al la infano distingi inter la lingvoj kaj scii kion li devas paroli al kiu kiam. Por beboj ĉio estas natura kaj akceptebla. Homoj dividiĝas en du malsamaj specoj, viroj kaj virinoj. La bebo lernas kaj akceptas tion, kio por eksterteranoj estas tre mallogika. Li simile povas kompreni kaj akcepti ke en la mondo virinoj parolas ruse kaj viroj itale, aŭ ke en la mateno oni parolas germane kaj en la posttagmezo turke. Kial ne? Kial homoj ne havu tri kruojn? Tio estus ege utila, kiam oni riskas fali pro glacio.

Infanoj, verdire, estas malgrandaj sed tre potencaj komputiloj kaj malofte eraras pri la lingvo, kiun ili devas paroli. Ili eĉ protestas, se la patrino parolas al ili en la "malĝusta" lingvo. Tio okazas eĉ tre frue, kia ili mem ankoraŭ ne parolas. Vi ne povas trompi 4-monatan bebon kaj abrupte ŝanĝi la lingvon, kiun vi kutime uzas kun li. Minimume li aŭ ŝi turnas la vizaĝon al la aliaj flanko aŭ ploras.

Sed pliaj esploroj ankaŭ montris, ke en multaj el la realaj situacioj la gepatroj kaj la tuta socio miksas du lingvojn sen aparta kohera regulo. Multaj esploroj estis faritaj en regionoj kun malplimulta lingvo, ekzemple Alzaco kie la homoj transiras de la germana dialekto al la norma franca, sed tio validas ankaŭ pri la italaj dialektoj. Se mi parolas kun Gianfranco Molle, la Esperanto-kantisto, kiu loĝas en vilaĝo apud la vilaĝo

de miaj gepatroj, ni baze parolas formon de dialektigita itala aŭ italogita dialekto sed daŭre alternas inter ĝi kaj la itala (kaj foje Esperanto) depende de la kunparolantoj, de la temo, ktp. Mi konas pakistanan familion en Italujo, kiuj konstante kaj laŭ malfacile kompreneblaj reguloj saltas inter la urdua, la itala kaj la angla (temas pri klera pakistana familio, kiu studis en anglalingvaj universitatoj).

Ĉiuokaze la rezultoj de la esploroj montras, ke ankaŭ en tiuj situacioj en la fino infanoj lernas ĉiujn koncernatajn lingvojn. Certe ili bezonas pli da tempo por distingi inter la lingvoj, sed en la fino ili parolas precize same kiel la gepatroj.

Tio ne estu invito ne sekvi la regulojn, ĉar ŝajne tio malfaciligas la vivon de la infanoj, kaj tio certe funkcias en mikslingvaj regionoj, sed se oni devas intrui la rusan en Palestrina, estas pli bone paroli ĝis daŭre, ĉar vi estas la sola fonto de la rusa por la bebo.

Alia danĝero de la sensistemeco en nemikslingvaj regionoj estas, ke en la fino la bebo parolas nur la lokan lingvon, kiu certe estas la plej forta. Se en Palestrina ankaŭ la patrino komencas paroli foje en la itala, la tre ruza bebo tuj komprenas, ke li ne bezonas lerni la rusan, kaj, ĉar neniu parolas la rusan en Palestrina, li tute ne lernos ĝin.

Preter la metodo, la vera grava faktoro

Ni ĉiuj scias, ke lernante fremdan lingvon po unu horon ĉiusemajne, eĉ se vi lernas ĝin dum 50 jaroj, en la fino vi ne parolos ĝin bone.

Fakte la vere ĉefa faktoro estas la tempo, dum kiu oni aŭdas la lingvon. Ni pensu pri infano, kiu parolas ruse kun la patrino, itale kun la avino, kiu kunloĝas, kaj Esperante kun la patro.

Kiam la infano estas tre malgranda verŝajne la rusa superregas, kaj ĝi konos 30 vortojn en la rusa, 15 en la itala, se ĝi (=li aŭ ŝi) restas sufiĉan tempon kun la avino kaj 1 vorton en Esperanto. Tio tuj ŝanĝiĝas se la patro ferias kaj ludas kun la infano la tutan tempon. Alivorte neniu povas postuli ke infanoj same bone konu ĉiujn lingvojn, se oni ne uzas ilin kun ĝi. Bonŝance la vivo havas plurajn fazojn, kaj ekzemple la itala, kiu povas esti apenaŭ parolata dum la unuaj jaroj, abrupte iĝas plej forta, kiam la infano vizitas la infanvartejon. Esperanto povas iĝi forta, se la infano renkontas aliajn infanojn, kiuj parolas Esperanton. Dum la ferioj en Rusujo la rusa refortiĝas, ktp.

Pro tio la ĝenerala regulo devas esti: helpu la plej malfortan lingvon. Se vi volas instrui la rusan kaj Esperanton en Palestrina, vi devas provizi vin per ruslingvaj kaj Esperantlingvaj filmoj, libroj, ktp. kaj

provi kiel eble plej paroli en la rusa kaj en Esperanto. Forgesu pri la itala kaj la italoj. Ili insistos pluparoli itale kaj per tio instruos vin al via infano. Ĉiuokaze la itala televido parolas en la itala. Vi ne bezonas helpi la italan. Vi bezonas helpi la aliaj lingvojn.

Dirinte tion, ni nur diru, ke ĉio ĉi estas en la

itnereso de la infano. Rerigardu la antaŭan parton de ĉi tiuj du artikoloj kaj vi malkveros, ke paroli du aŭ pli da lingvoj igas vin pli mense elasta.

Fonto: http://www.esperanto.it/rivista/artikolo_view.php?id=58

Poemoj

Edward Jaškiewicz, el Pollando

MALFACILA ELEKTO

Sporton preskribis min kuracisto,
Kion praktiki laŭ longa listo?:
Pro boks' verŝajne hom' kreteniĝas
Kaj vidkapablo plimalfortiĝas,
Por biciklisto esti unika,
Konsentu tuj kun malsan' varika.
Ĉu piedpilkon? Eble rugbeon?
Ĉu por ostrompo mi havas devon?
Eble naĝadon diras alia...
Sed pulmojn, koron protektas mi ja!
Tablotenison mi ne avidas,
Sur tenisejo mi tuj eksidas...
Marŝo defalas pro kal-doloro,
Por "Lotto- ludo" estu la gloro!

Verkis: Włodzimierz Scisłowski
Esperantigis: Edward Jaškiewicz

ORO

Plej instiga por la koro
Estas sak' plena da oro
Kaj amikojn ja vi havas,
Kiujn via oro ravas.
Sed kontraŭe estas tiam,
Se vi havas ĝin neniam.

Oro, via ĉefa celo,
Viv' sur tero - la ĉielo!
En or' havas vi dolarojn
Kaj sterlingojn, kaj dinarojn,
Frankojn, rublojn, jenojn, vonojn,
Markojn, zlotojn, levojn, kronojn.
Ne bezonas vi laboron,
Se vi havas tiun oron.
En or' ĝojo estas vera
Ne ĉiela sed la tera.
Se or' tintas en la sako,
Plena estas la stomako,
Ĉiuj servas vin ĝentile,
Sed ne dormas vi trankvile.
Ĉar hienoj kaj ŝakaloj
Trudigemaj animaloj
Ĉirkaŭ vi cirkulos ĉiam,
Do ripozos vi neniam.
Onasis havante oron
Ĉaspredis Ĵaklinan koron.
Ĉi ekzemplo mondkonata
Estas ja multobligata.
Do per oro je la fino
"mis" de l' mondo - belulino,
Kiel ja ĉio atestas,
Atingebla por ni estas.



Verkis: Edward Jaškiewicz

Poemo


verkis Angel Arquillos, el Hispanio

MI NOSTALGIAS

Mi nostalgias
pri tiu pasinta momento...
pri amo kaj sento,
pri vi
kaj pri nia hejmo.
Ĉio perdiĝis
aŭ eble, nur mi,
ĉar mi ne memoras
la mavajn momentojn,
kaŭzitaĵ de malpuraj ventoj,
kaj konfuzaj sentoj
pri amo kaj melankoli'

Mi nostalgias
pri mia juneco,
kaj mia najveco
ĉar en ĉi momento
mi ja simple vivas,
kun timo kaj kun malkontento,
sen amo kaj sen estonceco,
sen vi.
Mi nostalgias
kaj preĝas,
fojfoje mi ekkrias
kaj mi triste revas
viŝante rulantajn larmetojn.
Mia nostalgio,

-terura turmento-
rondiras
kaj kuras silente
ĉiam apud mi.
Kaj la pasinteco
repreni
ne eblas,
nur la nostalgion mi prenas
kun forto
kaj de tempo al tempo
mi kreas pro honto,
kaj mi nostalgios nur por
estonteco.



Esperanto kiel kultura heredaĵo estas internacia konkero

La pola ministrino de Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, prof. Małgorzata Omilanowska, decidis la 31-an de oktobro 2014 pri enskribo de la lingvo Esperanto kiel portanto de la Esperanta Kulturo en la Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo de Pollando.

Kiel ĉiuj sukcesoj atingitaj de la tutmonda E-komunumo, ankaŭ tiu ĉi havas multajn patrojn, sed mi mencias nur la iniciatinton, nome K. Krzyżak. Li ekhavis la ideon pri Esperanto kiel kultura heredaĵo kaj lanĉis kolektadon de apogsubskriboj al la propono prezentota al la Nacia Instituto de Kultura Heredaĵo, kiu estas aŭtonoma fako de la Ministerio pri Kulturo.

Iom pli frue (2012) fondiĝis Parlamenta Grupo Apoganta Esperanton, gvidata de la senatano Edmund Wittbrodt, eksministro pri edukado.

Rezulte de diskutoj, konsultoj kaj ekspertizoj, kiujn partoprenis aro da personoj, multe modifiĝis la komence formulita propono, kun la celo kongruigi ĝin kun la nocio "nemateria kulturheredaĵo".

Ĝia lasta versio nombris 37 paĝojn. Definitiva decido apartenis al la Ministrino de Kulturo, kiu aprobis resuman tekston de la enskribo sub jena titolo: La lingvo Esperanto kiel Portanto de la Esperanta kulturo.

Jen la resumita teksto:

Esperanto kiel Portanto de la Esperanta Kulturo.

Esperanto estas lingvo internacia, kreita de Ludoviko Zamenhof (1859-1917), naskiĝinta en Bjalistoko. Li publikigis en 1887 lernolibron, entenantan la principojn de tiu ĉi lingvo, kaj subskribis ĝin per la pseŭdonimo "Dr. Esperanto"; sekve de tio, la vorto Esperanto akceptiĝis kiel nomo de la lingvo mem.

Tiu ĉi plan-lingvo rapide akiris sian propran vivon kaj iĝis la bazo de kreskantaj grupoj de ĝiaj uzantoj.

Dum preskaŭ cent tridek jaroj, surbaze de Esperanto, la esperantista komunumo formis karakterizan vivkoncepton, inspiritan de la ideoj de Zamenhof, kaj ankaŭ kutimojn, tradicion, literaturon, simbolojn kaj eĉ siaspecan mitologion. Fondiĝis kaj plu funkcias multaj organizaĵoj kaj asocioj, faciligantaj la kontaktojn kaj kunlaboron en agado ligita kun la disvastigo kaj instruado de Esperanto kaj de ideoj ĝin akompanantaj.

Inter la esperantistoj formiĝis forta identecosento kaj grupligiteco super la konscio pri nacieca aŭ etna aparteno. La fakto senti sin esperantisto implicas la agnoskon de difinitaj valoroj kaj mondkonceptoj.

Al la Esperanta tradicio apartenas Universalaj Kongresoj de Esperanto, ĉiujare okazantaj en alia lando, kaj la festivalo Artaj Konfrontoj (ARKONES), kies loko estas ĉiam Poznano. La saman tradicion

konsistigas ankaŭ la memoro pri la kreinto de la lingvo, pri la pioniroj de la movado kaj ilia kontribuo al la Esperanta kulturo. La renkontiĝojn de esperantistoj kutime malfermas kaj fermas la kantado de la himno. Ankaŭ la funebraj ceremonioj de esperantistoj okazas laŭ karakteriza maniero, kun adiaŭo en Esperanto kaj ĉeesto de la Esperanta flago.

Kiel oficialajn memorigajn tagojn oni povas konsideri tiujn de la naskiĝo kaj morto de Ludoviko Zamenhof, respektive ĉiun 15-an de decembro kaj 14-an de aprilo.

En la lingvo Esperanto formiĝis propra frazeologio, idiomaĵoj, onidiroj, kiuj portas en si mem Esperantaj kulturvaloroj kaj specifaĵoj de tiu ĉi medio. Ekzistas riĉa literaturo, kreita en tiu ĉi lingvo.

La E-kulturo ampleksas ankaŭ komunumajn morojn kaj simbolojn kreantaj kaj subtenantaj la esperantistan identecon. La ĉefaj Esperanto-simboloj estas blazono (la kvinpinta verda stelo), himno (La Espero), la flago kaj la verda koloro de espero. Alia simbolo reprezentas la konturojn de la mondo (etendo de la lingvo en la mondo), manpremon (amikeco), la Babelturon (malebleco de interkompreno) kaj arbon, kiu simbolas kreskadon. Tiuj simboloj estas aplikataj al objektoj de ĉiutaga uzo kaj memoraĵoj."

Kia heredaĵo?

La difino de nemateria kultura heredaĵo, laŭ la Konvencio de Unesko akceptita de ĝia Ĝenerala Konferenco en 2003, klarigas ke tia estas socia fenomeno, kiu entenas kulturvalorojn, heredeblajn trans generacioj fare de komunumo posedanta sian identecon. Pollando ratifis la Konvencion en 2011. Tiam komenciĝis inventarado de la koncernaj objektoj, por enskribi ilin en la pollandan Liston de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj.

La liston fakte oni publikigis en 2014. Esperanto okupis sur ĝi la sesan lokon. Gravus emfazi ke en la Listo Esperanto aperas kiel "Portilo de la Esperanta Kulturo".

Do, Esperanto estas agnoskita de la ŝtata instanco kiel kultura lingvo. Kiom foje oni aŭdis, ke nia lingvo ne havas estontecon, ĉar mankas al ĝi kultura bazo!

Krome, oni oficiale rekonas la ekziston de la "Esperanta kulturo", kio memkompreneble implicas ĝian internaciecon.

Jen la vojo por enskribi Esperanton en la samtaman liston de Unesko.

Roman Dobrzyński (el revuo ESPERANTO, februaro 2015)

Fonto: <https://www.esperanto.torino.it/wp/?p=1517>

Patro kaj filo (1/2)

Ili loĝis iom ekster la vilaĝo, patro kaj filo. Ambaŭ nomiĝis Snjolfur, - Maljuna-Snjolfur kaj Malgranda-Snjolfur oni nomis ilin en la ĉiutaga vivo. Sed ili nomis alparole unu la alian nur Snjolfur. Estis ia kutimo ĉe ili tion fari, ili sentis ke la nomo pli forte ilin interligas; kaj ili ĉiam alparolis unu la alian Snjolfur, sen ia ŝanĝo. Maljuna-Snjolfur estis pli ol kvindekjara, sed Malgranda-Snjolfur estis nur iom pli ol dekdujara.



Intima estis ilia rilato, unu ne povis esti for de la alia. De kiam Malgranda-Snjolfur ekmemoris, ĉiam estis tiel.

Sed Maljuna-Snjolfur havis pli longan memoron. Li memoris ke antaŭ dektri jaroj li posedis grandbienon, situantan je unu-hora ĉevalirado de la vilaĝo, li havis bonan edzinon kaj tri bonajn kaj sanajn infanojn. Sed tiam la feliĉo forpasis kaj vico de malfeliĉaĵoj okazis. Liaj ŝafoj mortis pro pesto kaj la grandbrutaro mortis pro antrakso kaj aliaj malsanoj. Kaj tuj poste liaj infanoj malsaniĝis de kokluŝo kaj mortis ĉiuj tri - la tempo inter iliaj mortoj estis tiel mallonga ke ili estis entombigitaj kune. Venis la tempo, kiam Snjolfur estis devigita vendi la bienon por pagi siajn ŝuldojn. Li aĉetis la terlangon apud la vilaĝo kaj konstruis kabanon kiun li dupartigis per vando kaj fuŝkonstruis kradan kabaneton por sekigi fiŝojn. Post tio, li nur povis aĉeti malgrandan remboateton.

Malriĉa kaj mizera estis la vivo de la geedzoj en la kabano. Vere ili ambaŭ kutimis penlabori - sed al ili ne kutimiĝis al manko de sufiĉa nutraĵo kaj konstanta timo pri la venonta tago. Plej ofte li devis havigi al si la nutraĵon el la maro. Ofte la maro estis nedonema. Ili ne enlitiĝis sataj en ĉiuj vesperoj. Kaj por vestoj kaj komfortaĵo estis malmulta sumo.

Somere laboris la virino ĉe la komercisto pri sekigo de fiŝoj. Sed la sekigaj tagoj estis malmultaj kaj la salajro estis malgranda. Iom post nasko de Malgranda-Snjolfur ŝi mortis - ŝia lasta faro estis decidi lian nomon. - De tiu tago la patro kaj la filo loĝis solaj en la kabano.

Malgranda-Snjolfur malklare memoris terurajn penigajn tempojn. - Tiam li estis sola en la kabano kaj la tagoj estis longaj, vico de malĝojo kaj sufero - ĉar neniu zorgis pri li kiam li estis tiel juna, ke lia patro ne povis kunpreni lin por fiŝkaptado. Maljuna-Snjolfur devis ligi lin al la litofosto kiam li estis for, aŭ meti ĉiujn moveblajn objektojn flanken por ke al li ne okazu iu

islanda rakonto de Gunnar Gunnarsson

akcidento, ĉar hejme li ne povis resti. Li devis iri sur la maron por kapti nutraĵon.

Pli bone Malgranda-Snjolfur memoris pli agrablajn momentojn; li memoris mildajn somerajn tagojn sur la sunumita maro. - Li memoris ke li mem sidis en la pruo kaj rigardis Maljunan-Snjolfur enmeti la brilantan kaptajon. Sed ankaŭ tiuj tempoj estis amare miksitaj ĉar en iuj tagoj la ĉielo ploris kaj Maljuna-Snjolfur devis remi sola en sia boateto.

Tamen venis tiu tempo ke Malgranda-Snjolfur kreskis kaj fortiĝis sufiĉe por ke li povu iri kun Maljuna-Snjolfur en ĉiu ajn vetero. Kaj de tiam ili neniam forlasis unu la alian. Ili ne povis esti unu sen la alia. Se unu el ili movetis sin dum dormo, la alia vekigis tuj, kaj se unu estis sendorma, al la alia ne eblis dormi.

Oni povus pensi ke ili estis tiel interkordaj ĉar ili havis tiel multajn interparolaĵojn. Sed tiel ne estis. Ili tiel bone konis unu la alian kaj fidis unu la alian ke al ili ne bezonis interparoli. - Tagon post tago ili diris nur unu kaj unu vorton. Kaj tiam ili plej bone sentis sin unu ĉe la alia. Sufiĉis por ili rigardi unu la alian por esprimi sin.

Sed inter la malmultaj vortoj, kiuj iris inter ili estis frazo kiu estis ripetita ree kaj ree, estis ĉiam Maljuna-Snjolfur kiu alparolis Malgrandan-Snjolfur. La frazo estis jena: "Oni devas nur zorgi pri tio, pagi al ĉiuj ĉion kaj neniam ŝuldi ion al iu ajn kaj fidi al la providenco."

Ili preferis esti sen nutraĵo ol aĉeti ion kion ili ne povis pagi kontante. Ili kudraĉis vestojn el malnova sakŝtofo kaj riparaĉis kaj reriparaĉis ilin por kovri sian nudon, senŝulde.

Ĉiuj iliaj najbaroj ŝuldis al la komercisto, kaj nur fojfoje pagis - kaj neniam tute. Sed la patro kaj la filo neniam ŝuldis al iuj eĉ ne oeron, tiom longe kiom Malgranda-Snjolfur memoris. Sed antaŭ lia vivtempo Maljuna-Snjolfur havis konton ĉe la komercisto kiel ĉiuj aliaj. Sed pri tio Malgranda-Snjolfur nenion sciis.

Ili devis zorgi pri tio, ke ili havos sufiĉajn provizojn por la vintro, kiam ne eblis remi sur la maron dum kelktaga eĉ kelksemajna periodo pro blovegoj kaj neĝoŝtormoj.

Ili aŭ salis aŭ sekigis la fiŝojn por la vintra tempo, sed iom ili vendis al la komercisto por ke ili ne estu senmonaj dum la venonta vintro. Sed malofte ili posedis ion kiam la printempo venis kaj ofte estis elĉerpitaj la provizoj kaj la monujo antaŭ ol la vintro estis pasinta. Tiel estis ke plej ofte dum printempo la malsato suferigis ilin - plimalpli. Ili remis ĉiun tagon, kiam vetero permesis, sed ofte ili revenis sen kaptajo - aŭ nur kun malgrasa hipogloso sur la fundo de la boateto. Sed ili neniam plendis. Ili elportis siajn

suferojn, kvankam ili estis pezaj, kun la sama egalhumoro kiel la feliĉon, kiam ĝi malofte ridetis al ili, ĉar ili do ŝuldis nenion al iu ajn. Kaj la espero, kvankam ke ili ne ricevis nutraĵon hodiaŭ, eble tamen donos Dio al ili nutraĵon morgaŭ - aŭ postmorgaŭ - estis por ili do sufiĉa konsolo. Sed kiam la printempo estis iom pasinta, ili ofte estiĝis palaj kaj kun enkaviĝintaj vangoj kaj pezaj sonĝoj atakis ilin. Kaj longtempe ili kuŝis sendorme. - Kaj en tia mizeriga printempo - kiu estis iom pli malvarma kaj neĝoblova ol ordinare, kaj eĉ ne venis kvieta tago - venis la malfeliĉo denove al Maljuna-Snjolfur. Frue matene lavango trafis la kabanon kaj la patro kaj la filo kovriĝis sub ĝi. Al Malgranda-Snjolfur sukcesis kun ia nekomprenebla maniero fosi sin el la neĝamaso. Kaj kiam li vidis ke li sola ne povis trovi Maljunan-Snjolfur en la neĝamaso, li kuregis al la vilaĝo kaj vekis homojn. Sed la helpo venis tro malfrue - Maljuna-Snjolfur estis sufokita, kiam ili trovis lin finfine en la neĝamaso.

Ili metis la kadavron sur grandan ŝtonon sub roko, kiu estis proksime. Pli malfrue en la tago oni intencis veni kun sledo por transporti la kadavron en la vilaĝon. Malgranda-Snjolfur staris longtempe kaj karesis la blankajn harojn de Maljuna-Snjolfur. Li ion murmetis - neniuj aŭdis tion. Sed li ne ploris. Oni sentis ke li estas stranga knabo, ĉar de li ne falis unu larmo malgraŭ la perdo de lia patro, kaj oni havis malvarmajn sentojn al li pro tio. "Pensu, ke knabo en lia aĝo estas tiel malvarmsenta" la homoj diris inter si.

Tial okazis, ke neniuj tuj okupis sin pri li. Kaj li restis sola tie sur la terlango, kiam la homoj iris hejmen por havi matenmanĝon kaj venigi sledon por veturigi la kadavron.

La kabano estis delokita kaj tute disrompita. luloke vidiĝis partoj de laboroj elstarantaj el la neĝo, kaj dise vidiĝis diversaj iloj. Malgranda-Snjolfur vagis sur la marbordon por zorgi pri la boateto. Li nenion diris kiam li vidis ĝiajn frakasajojn disĵetiĝi tien kaj reen apud la marbordo, sed liaj brovoj peziĝis.

Poste li iris de la marbordo kaj eksidis sur la ŝtonon apud la kadavro.

Tiu estas malfavora stato, li pensis. Se la boateto estus sendifekta, li povus vendi ĝin, ĉar ie li devis trovi tion kion li bezonos por la funebra ceremonio. Snjolfur ĉiam diris ke je sia morto oni devas posedi monon sufiĉan por la enterigo, ĉar estas honto se ĝi estos je la kosto de la komunumo. Sed li aldonis ke ili ambaŭ povos morti trankvilaj ĉiam ajn ĉar la valoro de la kabano, la boateto, la iloj kaj la terlango estos almenaŭ sufiĉa por entombiga kosto por ili ambaŭ - je la aŭkcia vendo. Sed nun estis ĉio detruita krom la terlango. Kaj kiel li povis akiri monon per ĝi? Li timis

ke ĝi estas senvalora tiel malplena kaj detruita ... Kaj nun al li venis la penso ke li ne manĝis kaj li mortos de malsato, tion li forgesis ĝis nun. Vere li emis iri al la marbordo, vadi en la maron kaj dronigi sin. Sed tiam ili ambaŭ estus entombigitaj kune je la kosto de la komunumo. Kaj nun li sentis ke la respondeco estas en liaj manoj por ili ambaŭ. Kaj li ne havis kuraĝon por kaŭzi tion, ke ili ambaŭ kuŝu kun honto en la tombo.



Pri tia malfacila cerbumado Malgranda-Snjolfur malofte okupis sin. Li ekhavis kapdoloron kaj emis lasi ĉion al la fortuno.

Tiam li ekmemoris ke li havis neniun loĝlokon. Estos malvarme resti ekstere la venontan nokton.

Li konsideris kaj plue rekonsideris la aferon kaj poste li komencis kolekti laborojn kaj ĉevronajn rompaĵojn kaj ĉion kion li povus uzi por fari ŝirmejon. Li metis la laborojn oblikve kontraŭ la rokon super la kadavro, ŝirmis ĝin per velaj tukaĉoj kaj ŝovelis neĝon sur ĉion por ke estu pli varme. Estis iomet konsolo por li ke Snjolfur estos ĉe li dum kelkaj tagoj. Sed tio apenaŭ daŭros pli ol unu semajnon. Kiam li finis li rampis en la ŝirmejon kaj eksidis ĉe la kadavro. Li estis laca kaj malsata kaj dormemega. Sed tiam li ekpensis, kiel li, per iu maniero, povos pagi por la funebra ceremonio. Kaj subite rimedo venis en lian menson - ke li ankoraŭ povus savi sin mem. Kaj tuj la laco kaj dormemo estis for. Li rapide iris el la ŝirmejo kaj ekiris al la vilaĝo.

Li direktis sin rekte al la domo de la komercisto, rigardis nek dekstren nek maldekstren, li ne atentis, ke homoj rigardas lin kun malfavoreco.

"La knabaĉo" ili diris "kiu ne larmis pro la morto de la patro!" Kaj kiam li estis veninta, li rekte eniris la vendejon kaj demandis la butikiston ĉu li povus paroli kun la komercisto.

La butikisto iom hezitis, sed li frapetis la pordon de la kontoro. Baldaŭ venis la komercisto al la pordo, rigardis Malgrandan-Snjolfur kaj invitis lin eniri la kontoron.

(daŭrigota)

verkis: **Gunnar Gunnarsson**

tradukis : **Pétur Yngvi Gunnlaúgsson**

fonto: http://www.ismennt.is/vefir/esperant/la_tradukisto/esperanto/hejmen_01.htm

De la 11-a ĝis la 17-a de februaro 2018, Havano gastigos la 9-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto. La kongresa temo estos "Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en La Amerikoj".

TAKE estas kongreso iniciatita de la Amerika Komisiono de UEA, kreita en 1994, sed la Unua Latinamerika Kongreso de Esperanto, antaŭulo de la nuna TAKE, okazis en julio 1978 en Mariljo, Brazilo, kie kunvenis kvincento da kongresanoj.

Tiamaniere, post tiu unua sukcesa renkontiĝo, la amerika regiono decidis okazigi, principe, ĉiu-trijaran kongreson, sed la realo ne ebligis tion plenumi akurate, tamen, tiel ĝermis forumo por la amerika movado kunordige kun la Amerika Komisiono de UEA kaj la respektivaj landaj asocioj.

Aliflanke, dum la 90-aj jaroj, Havano fariĝis unu el la plej vizitataj urboj de Kubo kaj de tiam ĉiujare akceptas plurcentmilojn da turistoj el ĉiuj mondopartoj kaj el la tuta lando.

Kiel estas sciata, Kubo kaj Kuba Esperanto-Asocio havas jam longjaran sperton en la organizado de internaciaj eventoj, nome, la 75-a UK en 1990, la 6-a TAKE en 2004, la 95-a UK en 2010 lige kun ILEI-konferencoj, Junularaj Kongresoj kaj Infanaj Kongresetoj, interalie.

Stabila kaj sperta aktivularo kaj novaj generacioj de esperantistoj sin preparas por bonvenigi la internacian kongresanaron, kiu povos propraokule konstati la vivantecon de la kuba movado kaj aparte

laboros por plifortigi la regionan komunumon kun ĉiuj bonvolaj homoj pretaj levi la torĉon de Esperanto en la kontinento.

Laŭ la programo provizora oni antaŭvidas prelegojn pri la kongresa temo, seminariojn, fakajn kunsidojn, AMO-seminaron, forumojn, kulturajn spektaklojn, ekskursojn, dum-, antaŭ- kaj postkongresajn.

Kadre de la kongreso okazos la jara renkontiĝo de la kubaj esperantistoj kaj kunsido de la Komitato de KEA, la supera gvidorgano de la Asocio. Ni esperas akcepti 150-200 partoprenantojn. Bonvenon en Havano!

Loka Kongresa Komitato

Retejo de la 9-a TAKE: <http://www.esperanto.cult.cu>




La grandanima koro

La humanismo laika rilatas ne nur al ekzisto aŭ neekzisto de dioj, sed antaŭ ĉio turnas atenton por rilato al aliaj homoj.

Antaŭ nelonge tre emociis min unu el intervjuoj

kun Kazimierz Kutz. La sinjoro senatoro, kiel jam kutimas, parolis akresone, sobre kaj antiklerikale. Sed krom tio, kion mi jam scias pri liaj konceptoj, li aldonis jenan eldiron je temo de sia vivo familia kaj sintenon konsidere al morto:

“La eŭtanazio ne estas la memmortigo, sed la rajto al decidiĝo pri sia forpaso. Lun tagon mi mem la



tradukis Edward Jaśkiewicz, el Pollando

nepetata volontos diri: “Sinjoro Dio mi foriras”. La morto estas ja afero de digno. Tia estas la vivo. Ni ne forprenu la dignon de la homoj por bona morto. Min tre afliktas tiu ĉi temo ĉiam pli kaj pli. Iam mi lasos leteron kaj ekdormos por ĉiam. Mi ne estos deviganta miajn infanojn, ke ili protektu min kaj revenu tiucele el eksterlando al Pollando. De la infanoj oni ne devas ion postuli, oni devas ĉion doni al ili. Kaj poste ĉio laŭ ilia favoro. Tiamaniere edukis min patrino”.

Mi ne volas ĉiloke konsideri pri tio, kiel Kazimierz Kutz komprenas la nocion "Dio" ĉar liaj diversaj eldiroj je temo de la mondkoncepto kaŭzas impreson neparencecajn. Sed ne pri tio temas. Kutz kun Dio aŭ sen Dio ĉerpas sian vizion de la mondo el prudento kaj humanismo., sed ne de tia aŭ alia revelacio aŭ dogmoj.



Ekfascinis min la grandanimeco de la homo, kiu havas kvar infanojn, li ĉion volas doni al ili kaj nenion atendadas de ili. Tio estas speco de malavareco probable ne ofte renkontata. Mi supozas, ke tia grandanimeca pozicio spite al eksterajoj estas la ŝanco por aŭtentika amikeco kaj profunda reciproka sindono en la familio. La infanoj, kiuj ne sentas super si premon de devigo, havas ŝancon reciproki samreagon al tiu sincereco per simila grandanimeco kaj danko. Ho, kiom foje do interrilatoj la gepatroj – infanoj bazas sur mensogoj, reciprokaj atendadoj kaj pretendoj. Kutz dumtempe aplikis taktikon de purigo de antaŭkampo pri atendado de amikeco, kiu donas ŝancojn por aŭtentismo de sentimentoj kaj spontaneco de sindono. En tio estas saĝeco de la homo libera, sed ankaŭ la homo, kiu konas vivon kaj homan naturon.

Mi trovas en tiu ĉi eldiro ankaŭ distancon al mi prezentitan de la persono, kiu nenion devintas. Ĉar nek por si devas vivi, nek por aliaj. Vivas, ĉar volas, kaj tiom longe, kiom volos. Tia prezento de la afero kaj tiu nivelo de la homa libereco memorigas al mi alian maljunan sinjoron, prof. Zbigniew Religa, kiu antaŭ kelkaj jaroj mortadis antaŭ okuloj de tuta Pollando. Iom post iomaj kelktagoj li estis intervjuita de trudigemaj ĵurnalistoj, rakontante pri sia vivo, mortado,

malsano kaj timo, aŭ pli ĝuste pri ĝia manko. Religa la konscia ateisto, mortadis, rigardante rekten vizaĝon de la morto, kaj eĉ frostotremo skuadis dorson, kiam oni legis iliajn eldirojn.

Ĉe ambaŭ tiuj sinjoroj estas iu kortuŝa braveco kaj digno, kiuj permesas admiri ilin, kaj ankaŭ kuraĝigas iun ajn. La vivo estas ja peza transigo, dum kiu estas bone havi iun por sin apogi. Temas ne nur pri t.n. la plej proksimuloj, kiuj povas al ni doni sian manon, sed ankaŭ pri la personoj, kies sinteno povas esti por ni la instigo. Kaj mi ne havas ĉe tio almenaŭ penson pri aŭtoritatoj, kiujn mi pli ĝuste timas ol avidas. La aŭtoritato kiel la vivmodelo estas la kaptilo, kiu minacas al memstara pensado. Min interesas la homoj, kiuj al mi imponas, kvankam en aliaj aferoj eble kaŭzas disravigon, tiel, kiel tiu de Religa, kiu sin ligis kun partio “PiS” – (Juro kaj Justeco). La humanistoj ne bezonas aŭtoritatojn, sed de tempo al tempo estus bone utiligi inspirantan personon, kiu permesus al ni pli bone ekkompreni viv-aspekton.

verkis: Marek Krak


tradukis: Edward Jaśkiewicz

Fonto: **Fakty I Mity – (Faktoj kaj Mitoj) n-ro 12 (629) 23-29 III 2012 r.**

50 jarojn post la unua nuklea eksperimento fare de Francio en Polinezio

Hori Jasuo el Japanio

La 22an de julio 2017 en la ĵurnalo Mainiĉi aperis artikolo pri nukleaj eksperimentoj fare de Francio en Polinezio. Mi resume tradukos ĝin.



Ĉu vi scias, ke Francio faris nukleajn eksperimentojn en Polinezio en la suda Pacifika Oceano antaŭ 50 jaroj? En la atoloj Mururoa kaj Fangataufa

okazis 193 nukleaj eksperimentoj ĝis 1996 kaj ankoraŭ nun problemoj de nuklea poluado ne solviĝis.



Societo 193

Ekde la jaro 1960 Francio eksperimentis atombombojn en la dezerto Sahara en Afriko, sed sendependiĝinta Alĝerio rufuzis tion, sekve Francio komencis eksperimenti en la atoloj Mururoa kaj Fangataufa en la suda Pacifika Oceano. En la 90-aj jaroj Francio ŝajne ĉesis eksperimenti, sed en 1995–96 ĝi rekomencis, pretekstante, ke mankas al ĝi sufiĉa datumo. Tiutempe okazis granda kontraŭbatalo, kiu evoluiĝis eĉ en puĉon.



La memorkunsido pri tiuj eksperimentoj okazis en la urbo Papeete en la insulo Tahiti en julio. Al ĝi estis invitita s-ro Akiba Tadataŝi. Li oficis kiel la urbestro de Hiroŝima inter 1999 kaj 2011, kaj dume li estis la reprezentanto de “Urbestroj por paco”, al kiu nun membriĝas 7439 urboj el 162 landoj. Lia agado estis alte taksita, pro kio li ricevis Premion Ramon Magsaysay (memore al la filipina prezidento Magsaysay, kiu mortis en aviadila akcidento la 17an de marto 1957), alinome Nobelpremio de Azio.

S-ro Akiba flugis al la insulo Tahiti la 27an de junio.

Lin renkontis s-ino Lena Normann, virino en siaj 40-aj jaroj, kiu apartenas al "Societo 193". Antaŭe ŝi ne multe sciis pri la nukleaj eksperimentoj en Polinezio, sed tiun sintenon ŝanĝis la propono de tiutempa prezidento de Polinezio, ke li malkonstruu "Monumenton de la suferantoj pro la nukleaj eksperimentoj" por plimodernigi la havenon. Tiu monumento estis starigita de la grupo "Mururoa kaj ni" en 2006. Ses metrojn kvadrato ĉirkaŭ ĝi estas metitaj ŝtonoj el la atoloj Mururoa kaj Bikini, el Hiroŝima kaj Nagasaki kaj lastatempe ankaŭ el Fukuŝima, kie okazis serioza nuklea akcidento en 2011.

Tiu propono ŝanĝis eĉ "ordinarajn homojn". Lena sentis, ke la registaro intencas forviŝi parton de la historio kaj kaŝos la problemon de la nukleaj eksperimentoj kiel tabuon. Lena kaj aliaj junuloj kolektiĝis kaj fondis "Societon 193", memore al la 193 eksperimentoj en Polinezio fare de Francio.

Ili organizis manifestaciojn, kaj tiu novaĵo movis la mondon, sekve komenciĝis internacie movado kolekti subskribojn kontraŭ tiu propono. Ankaŭ en Japanio oni kolektis pli ol 30 000 subskribojn. Dank' al tiuj movadoj la prezidento retiriĝis, nenion farinte.

La societo pli kaj pli grandiĝis kaj nun ĝi havas mil membrojn. Por sukcesigi la 50-jaran kunsidon, ĝi ripete organizis manifestaciojn, kaj vizitis 43 distriktojn en polineziaj insuloj, informante la loĝantojn pri la problemo de la nukleaj eksperimentoj kaj kolektante iliajn voĉojn. Inter tiuj agadoj la plej grave estas realigi referendumon por postuli rekompenson de Francio.

En la vilaĝa kunsido

La 28an okazis malgranda kunsido en iu vilaĝo. Kiam s-ro Akiba atingis ĝin, tie lin atendis 80 vilaĝanoj. Post komuna spektado de filmo pri la nukleaj eksperimentoj, li parolis:

"Japanaj suferantoj pro la atombomboj agadas en tri kampoj: la unua estas publike paroli pri sia sperto, la dua estas postuli homajn rajtojn, kaj dank'al tio ili nun rajtas ricevi senpagan kuracadon, kaj la tria estas agadi por ke aliaj homoj ne spertu saman suferon kiel ili, kaj por tio ili agadas kontraŭ nukleaj armiloj kaj nukleaj eksperimentoj. Ni, japanaj, kunlaboros por ke viaj deziroj efektiviĝu."

Longe la loĝantoj en Polinezio estis silentaj pri suferoj pro la nukleaj eksperimentoj, ĉar ĉirkaŭ 5000 homoj laboris por la eksperimentoj, kaj ili trudite promesis, ke ili ne parolu pri siaj laboroj. En la 90aj jaroj pli kaj pli malkovriĝis poluado pro radioaktiva "morta cindro", sekve tiuj eksaj laboristoj komencis malfermi sian buŝon.

Ankaŭ en tiu kunsido loĝantoj parolis pri siaj spertoj:

"Ni estis avertitaj, ke ni ne manĝu fiŝojn kaptitajn en Mururoa".

"Soldatoj havis dozmetron, sed ni ne".

"Multaj homoj june mortis pro gaso el la vertikalaj truoj fositaj por la eksperimentoj".

"Multaj el miaj parencoj suferas pro tiroida kancero".

Juna patro alvokis al la ĉeestantoj: "Ni postulu, ke la registaro faru esploradon pri sanstato de la loĝantoj. Por movi ĝin, necesas forta movado. Ni petu de ĝi referendumon!"

Iu virino parolis: "Ni ne povas estis silentaj, ĉar tiuj eksperimentoj okazis en nia lando".

Memorkunsido de la 2a de julio

La memorkunsido okazis la 2an de julio, kaj kolektiĝis 1000 homoj. Ĝis tiu tago "Societo 193" sukcesis kolekti subskribon el 45000 loĝantoj, nome el kvarono de la tuta loĝantaro.



La reprezentanto de "Mururoa kaj ni" s-ro Roland (foto) diris: "Antaŭ ne longe malkovriĝis, ke

en la insulo Hao kun 1000 loĝantoj situanta 500 kilometrojn norde de Mururoa estas poluita de plutonio. La loĝantoj postulas, ke Francio purigu la teron, sed ĝi rifuzis. Se la tero sub Ejfel-turo estus poluita de plutonio, ĉu la registaro farus nenion?" "Ses jarojn antaŭe la franca registaro leĝigis kompensan sistemon, sed nur 2% el la petintoj estis akceptitaj. Ĝi reviziu la leĝon".



50 jarojn post la unua eksperimento kaj 20 jarojn post la lasta ankoraŭ large etendiĝas dezerta tero ne

enirebla en la franca polinezia atolo Mururoa.

Poste s-ro Akiba staris sur la podio kaj parolis:

"En 1973, kontraŭ la franca nuklea eksperimento, tiutempa urbestro de Hiroŝima sidostrikis kaj atombombaj suferantoj malsatstrikis". "Ankaŭ en Japanio oni bezonis 40 jarojn da malfacila agado por leĝigi leĝaron por helpi atombombitojn". "Unu el la celoj de nia movado estas reakiri niajn homajn rajtojn. Tiu movado baziĝas sur digno de homoj, nome justeco, tial nia movado certe venkos".



Oni bezonos multajn jarojn por venki. Lena, kiu surportas T-ĉemizon kun la cifero 193, staras antaŭ la monument kaj diris: “Nia devo estas informi la mondon pri la nukleaj eksperimentoj. Mi pli lernos pri Hiroŝima kaj Nagasaki”. Kie estas batalantoj, tie estas espero. Certe la

situacio boniĝos. S-ro Akiba diris kun emocio: “Junaj

homoj dividas siajn opiniojn kun lokaj homoj kaj ekstaras kun maljunaj homoj kaj ekleziuloj. Tio estas bona ekzemplo de la movado por homaj rajtoj”.

* Vi povos legi artikolon “The battle continues, 50 years after first test at Mururoa” sube:

<http://www.radionz.co.nz/international/pacific-news/307804/the-battle-continues,-50-years-after-first-test-at-mururoa>

Émile Boirac

el La Balta Ondo

Antaŭ cent jaroj, la 20an de septembro 1917 en strangaj cirkonstancoj

forpasis (spiritisme: “elkarniĝis”) profesoro

Émile Boirac, unu el la plej eminentaj

esperantistoj. Ĝuste al li

Zamenhof proponis la

prezidantecon de la unua

esperantista mondkongreso en Bulonjo-ĉe-Mar

(1905) kaj de la Lingva Komitato, fondita en ĉi tiu

kongreso. Okaze de la centa mortodatreveno de

rektoro Boirac ni publikigas artikolon pri li el la

baldaŭ eldonota enciklopedio Nia Diligenta

Kolegario (NDK), kiu entenas biografiajn artikolojn

pri ducent elstaraj esperantistoj.

Boirac, Augustin Émile [bŭarák]. Franco. Nask. 26 aŭg 1851 en Guelma (Alĝerio). Filo de negocisto Jean Boirac kaj ties edzino Feline Salvate-Portan. Studis filozofion kaj literaturon en la Bordoza Universitato, bakalaŭriĝis pri literaturo (1872), agregaciĝis pri filozofio (1874), doktoriĝis pri filozofio (1894) per la tezo “La ideo de fenomeno”. Ekde 1871 dum 26 jaroj instruis filozofion en francaj liceoj, fine en la renoma liceo Condorcet (1882-97). Profesoro pri filozofio kaj rektoro en la universitatoj de Grenoblo (1898-1902) kaj en Diĵono (Akademio de Diĵono, 1902-17). Membro-korespondanto de la Franca Akademio de Sciencoj Moralaj kaj Politikaj (1906).

En 1876 Boirac proponis la terminon “dĉjà vu” kaj iĝis konata fakulo pri paramnezio. Studis hipnozon (en 1911 premiita de la Akademio de Sciencoj), praktikis ĝin kaj spiritismon. Kun aliaj fakuloj esploris la mediumajn kapablojn de Eusapia Palladino. Aŭtoro de pluraj sciencaj, didaktikaj kaj popularaj verkoj (Baza kurso de filozofio, 1892; La ideo de fenomeno, 1894; Lecionoj de psikologio aplikata al edukado, 1902;



Kurso de moralo por normalaj lernejoj, 1905; Nekonata psikologio, 1908; Estonteco de la psikaj sciencoj, 1917 k. a.). Fondinto de la Elektroteknika Instituto en Grenoblo kaj de la Instituto pri Vino en Diĵono. Prezidanto de la mikologia societo en la dep. Côte-d’Or, aŭtoro de kuir-receptoj. Kavaliro de Honora Legio (1906).

En 1885 edziĝis kun Baptistine Rose Joséphine Bertrand (1859-1917); kvar infanoj (unu el ili, subleŭtenanto Émile Lucien Élie Boirac, naskita en 1890, batalis en fronto ekde la komenco de la Unua Mondmilito kaj mortis pro vundoj en majo 1915). Kvin monatojn post la forpaso de sia edzino (21 apr 1917) Boirac mortis 20 sep 1917 en Salses (dep. Pyrénées-Orientales) en malklaraj cirkonstancoj (Laŭ unu versio: dum spiritisma seanco; laŭ alia versio: per sia propra decido, perdinte la emon al la vivo.). Entombigita en Salces, 6 okt 1917 reseplita en Diĵono. Unu el la stratoj de Diĵono havas lian nomon.

Esp: 1900 (Adresaro, №5777) danke al la

matematikisto Charles Méray. Aktive propagandis Eon; post liaj prelegoj fondiĝis E-grupoj en kelkaj urboj. Enkondukis Eon en la programon de eksterlandaj studentoj en la Diĵona Universitato. Verkis kaj tradukis kelkajn librojn en/pri Eo, okupiĝis pri leksikografio, kompilis trivoluman vortaron Eo-Ean, kunlaboris en



L’Espérantiste, La Revuo, Oficiala Gazeto E-ista kaj aliaj E-gazetoj. Prezidis la 1an UK en Bulonjo-ĉe-Mar (1905) kaj kunredaktis kun Zamenhof la kongresan protokolon. Membro de KKK. Elektita de Zamenhof

kiel prezidanto de LK (1905). Membro de la Komitato de la Delegacio por Akcepto de Internacia Helplingvo, kiu 24 okt 1907 en lia foresto (lin anstataŭis Gaston Moch) akceptis principe Eon kun ŝanĝoj efektivigotaj de la Konstanta Komisiono de la Komitato de la Delegacio interkonsente kun LK. Dum la Ido-krizo (1907–08) komprenis, ke la centpersona LK ne estas laborkapabla kaj proponis fondi ties gvidorganon en la formo de Akademio, kies unua prezidanto li iĝis (1908–17). En 1912 kunfondis Mondan Asocion de Spiritismaj E-istoj kaj iĝis ĝia unua prezidanto.

Ĉefaj verkoj

Leibniz G.-W. Monadologio (Tr., 1902);
 Ŝlosileto kvarlingva franca, angla, germana, latina de la lingvo internacia Esperanto (1903);
 Perdita kaj retrovita (1904);
 Molière. Don Juan aŭ la ŝtona festeno (Tr., 1905);
 Qu'est-ce que l'espéranto? (1906);
 Le Congrès espérantiste de Genève (1906);
 Pri la homa radiado (1906);
 Tria Kongreso – Festo de La Revuo (1907);
 Dyke H. van. La kvara mago: aŭ la alia saĝulo (Tr., 1909);
 Plena Vortaro Esperanto-Esperanta kaj Esperanto-Franca (1909-10);
 Le problème de la langue internationale (1911);
 Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto (1911);
 Fundamentaj principoj de la vortaro Esperanta (1911).

Bibliografio

EdE, p. 57-58 k. a.;
 LZ, Vol. 1, p. 7-8 k. a.;

OVP, p. 36.

Condette J.-F. Les recteurs d'académie en France de 1808 à 1940. Tome II, Dictionnaire biographique. Paris, 2006, p. 76-77.

S-ro Émile Boirac (OGE, 1917-1918, №7-8);

Delcourt M, Amoroux J. Filozofo kaj esperantisto (Eo, 1977, №11);

Amoroux J. Émile Boirac (LG, 2011, №154).

Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Aŭtoroj: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonantoj: Sezonoj kaj Litova Esperanto-Asocio


320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Aperos en la fino de la Zamenhofa Jaro 2017

Prezo: 30 eŭroj

Jam antaŭmendebla kontraŭ 25 eŭroj



Fonto: La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2017/09/boirac>

Araby, rakonto de James Joyce en Esperanto

elangligis Jack Wilson

La strato Norda Richmond, estanta blinda, estis kvietata strato krom je la horo kiam la Lernejo de la Kristanaj Monaĥoj (Christian Brothers School) liberigis la knabojn. Neloĝata domo kiu enhavis du etaĝojn staris ĉe la blinda fino, apartigita de siaj najbaroj en kvadrata grundo. La aliaj domoj en la strato, konsciaj pri la decaj vivoj en si, rigardadis unu al la aliaj per brunaj, neperturbeblaj vizaĝoj.



La antaŭa loĝanto de nia domo, sacerdoto, mortis en la malantaŭa salono. Aero, moska pro longtempa enfermiteco, pendiĝis en ĉiuj ĉambroj, kaj la malŝparĉambro malantaŭ la kuirejo estis priŝutita per maljunaj

senutilaj paperoj. Inter ĉi tiuj mi trovis malmultajn paperkovritajn librojn, la paĝoj de kiuj estis bukaj kaj malseketaj: The Abbot, (La Aboto,) de Walter Scott, The Devout Communicant, (La Pia Komuniiganto,) kaj The Memoirs of Vidocq. (La Memoraĵo de Vidocq.) Mi pleje ŝatis tiun lastan ĉar ĝiaj folioj flavis. La sovaĝa ĝardeno malantaŭ la domo enhavis centran pomarbon kaj kelkajn senorde disajn arbedojn, sub unu el kiuj mi trovis la rustan bicikletan pumpilon de la mortinta loĝanto. Li estis tre sindonema sacerdoto; en sia testamento li jam dotis tutan sian monon al institucioj kaj la meblaron de sia domo al la fratino.

Kiam la mallongaj tagoj de vintro alvenis, krepusko falis antaŭ ol ni jam manĝis la vespermanĝojn. Kiam ni kunvenis en la strato la domoj sombrigiĝis. La spaco de la ĉielo supre havis la koloron de ĉiamvaria violo kaj al tio la lumigiloj de la strato levis siajn feblajn lanternojn. Nin pikis la malvarma aero kaj ni ludis ĝis niaj korpoj

lumetis. Niaj krioj eĥadis en la silenta strato. La kariero de nia ludo veturigis nin tra la mallumaj, kotaj vojetoj malantaŭ la domoj, kie ni trairis la praan krucpafadon de la sovaĝaj triboj de la dometoj, al la postaj pordoj de la mallumaj gutantaj ĝardenoj kie odoroj leviĝis el la cindraj kavetoj, al la mallumaj odoraj stabloj kie koĉero glatigis kaj kombis la ĉevalon aŭ skuis muzikon el la bukita jungilaro. Kiam ni revenis straton, lumo de la kuireja fenestro jam plenigis la areojn. Se mia onklo vidiĝis ĉirkaŭirante la angulon, ni kaŝis nin en la ombro ĝis ni vidis lin sekure endomiĝinta. Aŭ se la fratino de Mangan elvenis sur la pordan sojlon por alvoki la fraton veni enen por ties teo, de nia ombrejo ni spektis ŝin pririgardi la straton de supre ĝis malsupre. Ni atendis scii ĉu ŝi restos kaj se ŝi restis, ni forlasis nian ombrejon kaj rezignacie marŝis ĝis la ŝtupoj de Mangan. Ŝi atendadis nin, kun sia figuro difinita de la lumo tra la duonmalfermita pordo. Ŝia frato ĉiam incitetis ŝin antaŭ ol li obeis, kaj rigardinte ŝin mi staris apud la apogiloj. Ŝia robo svingiĝis kiam ŝi movis sian korpon, kaj la mola ŝnuro de ŝia hararo ekskuiĝadis flank-al-flanke.

Matene mi kaŝis min sur la planko en la antaŭa salono rigardante ŝian pardonon. La rulkurteno tiritis malsupren ĝis proksimume unu colo de la sojlo tiel ke oni ne povis min vidi. Kiam ŝi eliris sur la pordan sojlon mia koro eksaltis. Mi alkuris la koridoron, ekprenis miajn librojn kaj ŝin sekvis. Mi tenis ŝian brunan figuron ĉiam videbla kaj, kiam ni alvenis proksime al la punkto kie niaj vojoj apartiĝis, mi rapidigis mian paŝadon kaj ŝin pasis. Tio okazis matenon post mateno. Mi neniam alparolis ŝin, krom per kelkaj surfacaj vortoj, sed tamen ŝia nomo estis kiel alvoko al tuta mia fola sango.

La imago de ŝi akompanis min eĉ en lokoj la plej malagrablaj por amindumo. Sabaton vespere kiam mia onklino iris aĉetumi, mi devis iri porti iujn el la pakoj. Ni marŝis tra la kurbantaj stratoj interpuŝate de ebriaj viroj kaj marĉandantaj virinoj, inter la malbenoj de laboristoj, la stridaj litanioj de vendejo-knaboj kiuj staradis garde apud la bareloj kiuj enhavis porkovangojn, la naza ĉantado de stratkantistoj kiuj kantis, (canto kiel mar-canto aŭ kunvenu-kaj-aŭskultu...) pri O'Donovan Rossa**, aŭ balado pri la afliktoj en la patrujo. Tiuj bruoj ariĝis en unu sensaĵon pri vivo por mi: mi imagis, ke mi portadas mian kalikon sekure tra svarmo da malamikoj. Ŝia nomo eksaltis al miaj lipoj fojfoje en strangaj preĝoj kaj laŭdoj kiujn mi mem ne komprenis. Miaj okuloj ofte plenis je larmoj (mi ne povis diri kial) kaj foje inundado el mia koro ŝajnis verŝiĝi elen en mian sinon. Mi malmulte pensis pri la estonteco. Mi ne sciis ĉu mi iam alparolus ŝin aŭ ne,



aŭ, se mi alparolis ŝin, kiel mi povus diri al ŝi pri mia konfuzita adoro. Sed mia korpo estis kiel harpo kaj ŝiaj vortoj kaj gestoj estis kiel fingroj kurantaj sur la dratoj.

Unu vesperon mi iris en la postan salonon en kiu la sacerdoto mortis. Estis malluma pluva vespero kaj estis nenia sono en la domo. Tra unu el la rompitaĵoj vitroj mi aŭdis la pluvon incidi sur la teron, la subtilajn senĉesajn pinglojn el akvo ludadi en la akvozaĵoj. Lu fora lumigilo aŭ lumita fenestro glimis malsupre de mi. Mi dankemis, ke tiel malmulte mi povas vidi. Ĉiuj miaj sensoj ŝajnis deziri sin vuali kaj, sentante ke mi estas forglitonta disde tiuj, mi premis la polmojn de miaj manoj ĝis ili tremis, multfoje murmurante: "O amo! O amo!".

Finfine, ŝi parolis al mi. Kiam ŝi adresis la unuajn vortojn al mi, mi estis tiel konfuzita, ke mi ne sciis kion respondi. Ŝi demandis min, ĉu mi iros al Araby. Mi forgesis, ĉu mi respondis jese aŭ nee. Tio estus grandioza bazo; ŝi diris, ke ŝi amas iri.

--Kaj kial vi ne povos? Mi demandis.

Dum ŝi parolis ŝi girigis arĝentan braceleton ronde kaj ronde ĉirkaŭ la pojno. Ŝi ne povos iri, ŝe diris, ĉar okazos retrekuniĝo dum tiu semajno ĉe ŝia monaĥinejo. Ŝia frato kaj du aliaj knaboj batalis por siaj ĉapoj, kaj mi solis ĉe la apogreloj. Ŝi tenis unu el la pikiloj, inklinante sian kapon al mi. La lumo de la lumigilo kontraŭ nia pordo kaptis la blankan kurbon de ŝia kolo, lumigis la hararon kiu tie kuŝis kaj, falante, lumigis ŝian manon sur la apogrelo. Ĝi falis trans unu flanko de ŝia robo kaj kaptis la blankan borderon de subjupo, apenaŭ videblan dum ŝi staris trankvile.

--Estas bone por vi, ŝi diris.

--Se mi iros, mi diris, mi alportos al vi ion.

Kiom sennombraj malsaĝaĵoj rubigis miajn vekajn kaj dormajn pensojn post tiu vespero! Mi esperis ekstermi la tedajn intervenajn tagojn. Mi ribelis kontraŭ la laboro de lernejo. Nokte en mia dormĉambro kaj tage en la klasĉambro imago pri ŝi venis inter min kaj la paĝon kiun mi klopodis legi. La silaboj de la vorto

Araby* vokiĝis al mi tra la silento en kiu mia animo luksis kaj sorcis orientan ĉarmon sur min. Mi petis permeson iri al la bazaro sabaton nokte. Mia onklino surpriziĝis, kaj esperis, ke tio ne estas ia framasona afero. Mi respondis al malmultaj demandoj en la klaso. Mi spektis la vizaĝon de mia majstro transiri de afablemo al severeco; li esperis, ke mi ne komencas maldiligenti. Mi ne povis kunvoki miajn vagadajn pensojn. Mi apenaŭ havis ajnan paciencon por la serioza laboro de la vivo kiu, ĉar ĝi staris inter mi kaj mia deziro, ŝajnis al mi kiel infanludo, malbela monotona infanludo.

Sabaton matene mi memorigis mian onklon, ke mi deziras iri al la bazaro en la vespero. Li serĉbaraktis ĉe la koridora tablo, serĉante la ĉapel-brosilon, kaj respondis al mi abrupte.

--Jes, knabo, mi scias.

Ĉar li estis en la koridoro mi ne povis eniri en la antaŭan salonon kaj kuŝi ĉe la fenestro. Mi foriris la domon en malbona humoro kaj marŝis malrapide cele al la lernejo. La aero estis senkompate kruda kaj mia koro jam febliĝis al mi.

Kiam mi revenis hejmen por ĉefmanĝo mia onklo ankoraŭ ne estis hejme. Tamen estis frue. Mi sidis rigardante horloĝon dum iom da tempo kaj, kiam ĝia tiktakado komencis ĝeni min, mi eliris el la ĉambro. Mi grimpis sur la ŝtuparo kaj gajnis la supran parton de la domo. La altaj, malvarmaj, malplenaj, malgajaj ĉambroj liberigis min kaj mi iris de ĉambro al ĉambro kantadante. Tra la antaŭa fenestro mi vidis miajn kamaradojn ludantaj malsupre en la strato. Iliaj krioj atingis min malfortiĝataj kaj malklaraj kaj, inklininte

mia frunton kontraŭ la malvarman vitron, mi rigardis transen al la malluma domo en kiu ŝi loĝis. Eble mi staris tie por unu horo, vidante nenion krom la brunvestitan figuron montritan de mia imagado, diskrete de la lamplumo tuŝitan je la kurbita kolo, je la mano sur la apogreloj kaj je la bordero sub la robo.

Kiam mi denove revenis malsupren mi trovis Sinjorinon Mercer sidanta ĉe la fajro. Ŝi estis maljuna, babilema virino, vidvino de lombardisto, kiu kolektis uzitajn poŝtmarkojn por ia pia celo. Mi devis elteni la klaĉon ĉe la te-tablo. La manĝo longiĝis ĝis pli ol horo kaj mia onklo ankoraŭ ne venis. Sinjorino Mercer staris por foriri: ŝi bedaŭris, ke ŝi ne povas atendi plu, sed estis post la oka kaj ŝi ne volis esti ekstere malfrue, ĉar la nokta aero estis malbona por ŝi. Kiam ŝi foriris mi komencis marŝi tien-reen en la ĉambro pugnante la manon. Mia onklino diris:

--Mi timas, ke vi eble prokrastos vian bazaron en ĉi tiu nokto de Nia Majstro.

Je la naŭa horo mi aŭdis la ŝlosilon de mia onklo en la koridora pordo. Mi aŭdis lin parolanta al si kaj mi aŭdis la koridor-tablon ŝanceli kiam ĝi ricevis la pezon de lia surtuto. Mi povis interpreti tiujn signojn. Kiam li estis duonfininta sian ĉefmanĝon mi petis, ke li donu al mi la monon por iri al la bazaro. Li estis forgesinta.

Elangligis Jack Wilson

Fonto: <http://esperanto-jack-wilson.blogspot.com.tr/2009/07/araby-by-james-joyce-in-esperanto.html>

"Aĉeti tempon" feliĉigas

Liu havas monon, tiu ne aĉetu multekostaĵojn, sed "aĉetu tempon", diras usonaj esploristoj. Ĉar kiu igas tedajn devojn kiel purigado plenumi de aliaj homoj, tiu sentas malpli da streso kaj tiel estas pli kontenta.

Tempo estas valora, kaj ĉe plej multaj homoj ĝi estas ĉiam malabunda. Tiu daŭra streso estas nek aparte sana nek ĝi feliĉigas. Eĉ sufiĉe riĉaj homoj suferas pri tio. Sed bona vivenspezo ja ofertus la eblecon aĉeti por si liberecon, skribas esploristoj de la Harvard universitato. Ĉar per tio eblus delegi neŝatatajn aktivecojn kiel purigado, aĉetado aŭ falĉado de gazono.

Por la aktuala studaĵo la esploristoj enketis ĉe pli ol 6000 homoj el Usono, Danlando, Kanado kaj Nederlando, kiom da mono ili elspezas por pagi aliajn homojn por tedaj devoj kaj kiel kontentaj ili estas pri sia vivo. Fakte tiuj partoprenantoj estis signife pli kontentaj kiuj elspezis pli da mono por delegitaj

el Esperanta Retradio Blogspot



servoj.

Laŭ la esploristoj ĉe tio ne faras diferencon kiom da mono la homoj vivenspezis aŭ kiom da mono ili elspezis por helpantino en la domo. "Ni pensis ke tiu efiko aperos precipe ĉe homoj kun pli alta dungaĵo, sed surprize ni trovis ĝin en la tuta spektro de vivenspezo", opinias pri tio kunaŭtorino de la universitato de Brita Kolumbio. La esploristoj tamen koncedas ke nur malgranda parto de la partoprenantoj devenis el la malsupra nivelo de vivenspezo. Kaj homoj kiuj luktas por kontentigi siajn bezonojn,

verŝajne ne estus pli kontentaj, se ili elspozus la malmultan monon ankoraŭ por pagi servojn.

Tiu tezo estis ankaŭ konfirmita per malgranda eksperimento ĉe kiu 60 partoprenantoj ricevis etan sumon. Per tiu sumo ili devis aŭ iri por fari aĉetojn aŭ pagi iun por purigado, kuirado aŭ io simila. La subjektiva kontenteco estis post la "aĉetita" libertempo signife pli granda ol post la aĉetado en vendejoj.

Malgraŭ tio multaj homoj ne elspozas sian monon por tempoŝparaj servoj, eĉ se ili finance kapablas, diras la esploristoj. Tiel apenaŭ la duono de 818 milionuloj kiuj ankaŭ en la kadro de la studaĵo estis enketitaj, indikis ke ili ne elspozas monon por delegi dommastrumajn devojn al aliaj homoj. Tiel laŭ tio multaj virinoj ekzemple ankoraŭ sentas ke ili devas mem plenumi siajn endomajn devojn - ankaŭ se ili

havas sufiĉe da mono por pagi aliajn homojn por tio.

Oni tamen ne elaĉetu sin de ĉiuj devoj ĉar tiam la pozitiva efiko povus inversiĝi. Se ĉiuj taskoj de la ĉiutago estas plenumataj de aliaj homoj, tiam povus aperi la sento ke oni ne plu havas sian vivon en la propraj manoj - kio same damaĝus la kontentecon.

La koncepto de la "aĉetita" tempo laŭ la esploristoj povus ankaŭ esti uzata en la labora medio, ekzemple se labordonantoj disdonas biletojn por servoj anstataŭ por pago de bonusoj. Pilota studaĵo kun usonaj kuracistoj jam sukcese testis tiun ideon.

Fonto: <http://esperantaretradio.blogspot.gr/2017/07/aceti-tempon-felicigas.html?view=flipcard>

Vi povas legi kaj aŭskulti la artikolon en la supra ligilo.

Nur mil parolantoj de Esperanto en Ĉinio

Same kiel pri la nombro de esperantistoj en la tuta mondo, ankaŭ pri la kvanto de parolantoj en Ĉinio cirkulas plej fantaziaj ciferoj. Post iom da sondado Liu Xiaozhe tamen konkludas, ke verŝajne nur kelkcent homoj en Ĉinio, kaj preskaŭ certe ne pli ol mil, efektive scipovas paroli Esperanton.

En la artikolo Esperanto en Ĉinio, mi skribis, ke nun en Ĉinio laŭ mia takso estas malpli ol mil homoj, kiuj povas paroli Esperanton en diversaj niveloj. Oni demandis min, de kie venis tiu nombro.

Mankas en Esperantujo firmaj organizoj, kiuj povus ekzakte enketi datenojn pri Esperanto. Oni ankaŭ malfacile difinas, kio estas "scipovi paroli" iun lingvon. Sed taksu la nombron de Esperanto-parolantoj en Ĉinio ne estas tiel malfacile kiel oni imagas.

Antaŭ ĉio bonvole rimarku, ke mi ne uzas la vorton esperantisto, pri kiu oni ofte disputas. Mi uzas la esprimon parolanto de esperanto, kiu pli klare karakterizas homojn, kiuj parolas Esperanton. Do tio simpligas la aferon.

En Ĉinio estas malmultaj parolantoj de Esperanto, kion mi povas konstati per miaj renkontiĝoj kun lernantoj kaj subtenantoj de Esperanto, dum mia vojaĝo en diversaj provincoj. En iuj urboj, kvankam la mezuro de la Esperanta movado estas granda, tamen plejparto de la partoprenantoj estas nur subtenantoj de la ideo de Esperanto, sed ne parolantoj de tiu lingvo.

En fotoj raportantaj pri la Esperanta movado en Ĉinio, oni povas vidi multajn partoprenantojn, kiuj plejparte fakte ne scipovas paroli Esperante. Iuj prezidantoj de Esperantaj asocioj scipovas diri nur "Saluton" en Esperanto. Nia asocia estro, kiu fervore laboras por Esperantaj laboroj, skribis "jis

Solis (Liu Xiaozhe), el Ĉinio

laivedo" ("ĝis revido") por adiaŭi nin en la reto.

Pro la malmulteco de parolantoj de Esperanto, en la sama urbo kaj eĉ en la sama provinco, preskaŭ ĉiuj parolantoj konas unu la alian. Nome, se iu kapablas paroli Esperante, certe li scias, kiuj aliaj en la loko povas paroli tiun lingvon, kaj certe li estas konata de aliaj parolantoj.

Por ricevi relative precizan nombron, mi afiŝis en la Ĉina Esperanta Forumo, petante helpon de parolantoj de Esperanto el aliaj provincoj de Ĉinio. Mi petis, ke oni prezentu al mi jenajn ciferojn: Kiom da loĝantoj estas en viaj urbo kaj provinco? Kiom da parolantoj de Esperanto estas en viaj urbo kaj provinco?

Unue mi mem respondas pri la nombroj de niaj urbo kaj provinco: En nia urbo Urumqi (la ĉefurbo de la provinco) estas 3,5 milionoj da loĝantoj, el kiuj estas 3 parolantoj de Esperanto. En nia regiono (provinco) Xinjiang estas 23 milionoj da loĝantoj, inter kiuj estas ĉirkaŭ 5 parolantoj de Esperanto.

Sinjoro Venki (Zhao Wenqi) informis min, ke en la urbo Guangzhou (la ĉefurbo de la provinco) estas 14 milionoj da homoj, el kiuj li konas 10 parolantojn. En la provinco Guangdong loĝas ĉirkaŭ 100 milionoj da loĝantoj, el kiuj estas 20 parolantoj.

Sinjoro Chielismo (Wang Tianyi) diris, ke en la urbo Xi'an (la ĉefurbo de la provinco) estas 8,2 milionoj da loĝantoj, el kiuj estas 5 parolantoj. En la provinco Shaanxi estas 37 milionoj da loĝantoj, el kiuj estas 10 parolantoj.

Sinjoro Zhou Qi diris, ke en la urbo Chengdu (la ĉefurbo de la provinco) estas ĉirkaŭ 14,3 milionoj da loĝantoj, en la provinco Sichuan estas 82 milionoj da loĝantoj. La 20 parolantoj en la provinco ĉiuj estas en



la urbo Chengdu.

Sinjoro Kolono (Cao Baozhu) informis min, ke en la urbo Tianjin (administrata rekte de la ŝtato, kun la sama administra rango kiel provinco) estas 13 milionoj da loĝantoj, el kiuj ĉirkaŭ 25 povas paroli esperanton. Tamen mi iom dubas pri tiu nombro. Komence li fanfaronis, ke en Tianjin estas 100 parolantoj, kaj poste li konfesis sian troigon. Sed mi suspektas, ke lia lasta nombro ankoraŭ estas troigita.

En urbego, kies loĝantaro superas 6 milionojn, la demandito rifuzis respondi la demandon, eble pro honto pri la nombro, murmurante, ke tia enketo estas sensignifa. Kaj dum mia enketo, ankaŭ aliaj kelkaj subtenantoj de Esperanto esprimis similan opinionon.

Ĝenerale la ĉefurboj ekonomie kaj kulture estas pli progresintaj ol aliaj partoj de la provinco. Analizante la superajn nombrojn, kunligante mian sperton, mi taksis, ke en la provinca ĉefurbo estas ĉirkaŭ 1 parolanto el miliono da homoj, kaj en tuta provinco estas ĉirkaŭ 1 parolanto el 3 ĝis 5 milionoj da homoj.

Ĉar la nombroj de la provinco jam inkluzivas tiun de la provinca ĉefurbo, tial mi kalkulas nur laŭ la nombroj de la provincoj. Nun en Ĉinio estas 34 provincoj aŭ samrangaj administrataj regionoj kun 1406 milionoj da loĝantoj. Do laŭ la proporcio de Esperantaj parolantoj en provinco, la nombro en la tuta Ĉinio estas ĉirkaŭ 300 homoj.

Eble iuj opinias, ke la statistikantoj forgesis kelkajn parolantojn. Do ni duobligu la numerojn, kaj la rezulto estas 600 homoj. Se fidelaj samideanoj opinias, ke tiu numero damaĝas ilian senton, ni triobligu la nombron, sed la rezulto daŭre malsuperas la nombron 1000!

Mi diskutis tiun temon kun Esperanta veterano. Lia respondo estas pli malesperiga: Estas malpli ol 100 ĉinoj, kiuj bone parolas Esperanton! Mi pensas, ke eble li juĝas ĉinajn parolantojn laŭ sia lingva perfekteco.

Estas imageble, ke multaj subtenantoj de

Esperanto abomenas min pro tiu malesperiga nombro. Do kial mi faras tion? Mi ne estas malamiko de Esperanto. Mi eklernis Esperanton antaŭ 35 jaroj, kiam mi estis 16-jara. Mi ne povas diri, kiam mi esperantistiĝis, ĉar ĝis nun mi ne kuraĝas diri, ke mi jam vere posedas tiun lingvon.

Mi enketas la nombron de ĉinaj Esperantaj parolantoj kun antaŭvidebla mizera rezulto, ne por sonorigi la funebran sonorilon por Esperanto. Mi volas sonorile veki samideanojn!

Troaj mem-dignigo kaj fanfaronado estas la komunaj karakterizoj de malfortaj sociaj grupoj. Milionoj da parolantoj de Esperanto en la mondo estas malvera nombro. Sed ni mem devas sobre koni nian veran situacion. Ni ne estu trompitaj de la fumbombo pafita de ni mem.

Agnoski problemon estas bazo por solvi problemon. Solvi problemon eble estas nefacile. Sed problemo estas nesolvebla, se oni ne agnoskas aŭ eĉ kaŝas la problemon.

Ĉinoj konsistigas ĉirkaŭ 19% el la monda loĝantaro. La Esperanta movado en Ĉinio certe estas grava parto de tiu en la mondo. Internacia Esperanta movado sen Ĉinio estas nekompleta kaj kripla.

Kvankam la kvanto ne decidus ĉion, ĝi estas grava bazo de disvolviĝado de la movado.

En Ĉinio ne estas tiom da parolantoj, kiom oni propagandas. La veran nombron la subtenantoj ne volas agnoski, kaj ĝi estas ignorebla kompare kun la nombro de la loĝantoj en Ĉinio.

Kiu estas la kaŭzo de tia situacio? Kie estas la eliro? Ĉu restas espero je la Esperanta movado en ĉi tiu grandega lando?

Fonto: Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/2017/09/21/nur-mil-parolantoj-de-esperanto-en-ĉinio/>

Lingvolernado laŭ aĝo kaj kapablo

Kiel mi jam diris en antaŭa sonartikolo, estas unuavice junaj homoj kiuj eklernas kroman lingvon. Tio povas okazi jam en la familio (se la gepatroj parolas malsamajn lingvojn), en la infanvartejo aŭ en lernejo. En ĉiuj tiuj kazoj ne la infano decidas pri la lingvolernado, sed la gepatroj aŭ la ŝtato. La ŝtato diktas la instruadon de la landa lingvo kiujn la infanoj de enmigrintoj devas lerni por regi ĝin estonte (preskaŭ) same bone kiel denaskaj parolantoj de la landa lingvo.

Kaj la ŝtato ankaŭ ordonas kiu fremdlingvo estu instruata ekde kiu aĝo. En mia lando Aŭstrio tio estas la angla lingvo, kiu estas iomete instruata jam ekde la

bazlernejo, sed vere nur post la bazlernejo. Se temas pri la lernado de dua fremda lingvo, tiam la lernantoj plej ofte jam havas elektelecon, ĉu ili ekzemple volas lerni la francan, la hispanan aŭ la rusan.

Do, ju pli homo progresas laŭ aĝo, des pli lingvolernado okazas laŭ propra volo. Ĉiu ja devas decidi por si mem kiu lingvo estos bezonata por la plua vivo, ĉu por studado en universitato, ĉu por havi vivopartneron, ĉu por la profesio. Se iu serĉas vivopartneron el alia lando, tiam la scipovo de la lingvo de tiu lando estas granda avantaĝo. Sed se juna homo ankoraŭ ne scias el kiu lando devenu la serĉota vivopartnero, tiam gravas la scipovo de internacia

lingvo, ĉu la angla, ĉu Esperanto.

Aliflanke se mankas vera bezono pri lernado de kroma lingvo, tiam la intereso pri la lernado de plua lingvo dependas de persona kapablo, de sociaj kaj kulturaj interesoj kaj de disponebla libertempo por okupiĝi pri tio. Junaj plenkreskuloj tamen en tiu aĝo apenaŭ havas liberan tempon por okupiĝi pri io tia, ĉar la trovo de laboro, la fondado de familio, kaj eble la konstruado de propra domo forte okupas ilin.

Do libervola, laŭplaĉa okupiĝo pri kroma lingvo (ekz. pri Esperanto) povas okazi nur post tiu vivofazo, do ekde proksimume la 40-a vivojaro. Ne estas granda procentaĵo da homoj kiuj en tiu aĝo ankoraŭ kapablas lerni kroman lingvon, sed se ekzemple temas pri instruistoj kiuj ja por sia profesio bezonas altajn lingvajn kapablojn, tiam estas tre bone imageble ke ili kapablas lerni Esperanton tiel bone ke ili povas partopreni en la internacia E-komunumo.

Se la E-komunumo volas plivastigi sian homan bazon, tiam indas koncentriĝi pri tiu celgrupo, ĉar tie estas homoj kiuj povas atingi regadon kaj de la parola

lingvo kaj la aktivan regadon de la skriba lingvo. La Esperanta Retradio estas trafa ekzemplo por tio kiel tio funkcias.

Fonto: <http://esperantaretradio.blogspot.gr/2017/07/lingvolernado-lau-ago-kaj-kapablo.html?view=flipcard>

Vi povas ankaŭ aŭskulti la tekston en la supra ligilo.



Mi surteren kuŝas kun anĝelo

Ĝiaj kantoj pretiĝis, kaj la libro finiĝis! Mi unue alvokis la viron kiu dumlonge prizorgis mian ĝardenon. Mi sciigis al li, ke li ne plu laboros ĉi tie. Li ŝajnis tre surprizita, kaj ĝi malĝojis. Mi ne povis diri al li la kialon, sed mi nur diris ke li mem tute ne estis la problemo. Do mi sendis lin for.

Mi sidiĝis kaj trinkis kafon. Mi fumis unu maldikan Cohiba cigaron.

Poste mi eliris la domon kaj aĉetis kelkajn pioĉojn, pikfosilojn kaj ŝovelilojn, kaj ĉion ajn alian mi bezonis por kompleti la meĥanisman sur kiun mi dumlonge pensis dolorigante mian kapon. . . .

Mi iris kaj staris kontraŭ la dafno-arbo kaj rakontis al ĝi ĉion, kio okazas. Tiam mi petis ĝian permeson. . . .


Mi laboris nokte kaj dormis tage. Mi preskaŭ mortus pro la lacigege laboro sed ŝajnis al mi, ke mi iel sukcesis pluri. Ni ĉiuj sciis ke ekzistis granda roko sub grundo en la ĝardeno. . . .

La kvara tago. La longeco kaj larĝeco, estas preskaŭ la sama kun tiuj, kiujn mi kalkulis antaŭe.

Unu fino de la fosaĵo estis al la direkto de jakarando arbo, la alia al la direkto de dafno-arbo.

verkis Haluk Mesci, el Turkujo

La elfositan teron, kaj la materialojn, kiuj alvenis el la vendisto de konstrumaterialoj, mi jam kun zorgemo amasigis sur la ĝusta flanko de la meĥanismo.



Je la fundo de la fosaĵo mi etendis du tavolojn de nilona kovrilo. La hoson alvenantan de la naĝejo mi kun zorgemo instalas. . . .

Mi duŝis min bone. Mi vestiĝis. Mi surmetis la aŭdilojn sur miajn orelojn kaj komenĉis aŭskulti la kantojn de la libro. Mi kuŝis en la fosaĵon. Mi fermis la okulojn kaj premis la butonon, kiu aktivigos la meĥanisman, kiu kovros min per la elfosita tero. . . .

esperantigis Vasil Kadifeli



EL LA UNUA PARTO - TAŬO



30

Tiu, kiu helpas laŭ la maniero de TAŬO al homreganto,
ne perfortas per armiloj la mondon,
ĉar la agoj refalas sur la propran kapon.
Kie restadis armeoj, kreskas kardoj kaj dornoj.
Post la bataloj sekvas ĉiam jaroj de malsatego.
Tial la bonulo serĉas nur la sukceson, nenion plu;
li ne kuraĝas konkeri per perforto.
Do sukceso sen fanfaroni,
sukceso sen glori sin,
sukceso sen fieri,
sukceso, ĉar ĝi necesas,
sukceso sen glori perforton.

Rimarkoj de Cezar

Anniespera mencias en siaj rimarkoj pri la traduko de Vilhelmo, ke en la originala teksto troviĝas ankoraŭ la sekvaj frazoj, tradukitaj de Wang Chongfang:

"La estaĵoj, atinginte sian plejfortecon, devas kreski maljunaj,

Kio estas kontraŭ la Taŭo.

Kaj ĉio, kio estas kontraŭ la Taŭo, senescepte iras al sia baldaŭa pereco."

La kontraŭmilitemo kaj pacamo de Laocio estas impresa kaj tre aktuala. Ankoraŭ nun ekzistas multaj registaroj, kiuj supozas, ke oni povu regi la mondon per perforto. La unua fama filozofia pacbatalanto en la mondo estis sendube Laocio. Ke oni ĝis nun ofte ne komprenas la majstron, estas malĝojiga.

Cetere, tiun senkompromisan pacamon oni trovas ankaŭ ĉe Zamenhof. Tio estas la sama pacamo, el kiu ekestis Esperanto.

31

Armiloj estas malbonsignaj iloj,
ĉiuj estaĵoj abomenas ilin.
Tial, tiu, kiu agas laŭ la maniero de TAŬO,
ĉiam estas for de ili.
La noblulo en sia kutima vivo
rigardas la maldekstran flankon kiel honorlokon.
Ĉe la armeoj
la dekstra flanko estas la honorloko.
La armiloj estas malbonsignaj iloj,
ne iloj por la noblulo.
Nur, se li ne povas agi alie, li uzas ilin.

Trankvilo kaj paco estas por li la plej grava.

Li venkas, sed li ne ĝojas pri tio.

Tiu, kiu ĝojas pri tio, ĝojas ja pri la murdo je homoj.

Tiu, kiu ĝojas pri la murdo je homoj,
ne povas atingi sian celon en la mondo.

Ĉe feliĉigaj kazoj oni rigardas la maldekstran flankon kiel honorlokon.

Ĉe malfeliĉigaj kazoj oni rigardas la dekstran flankon kiel honorlokon.

La subbatalestro staras maldekstre.

La supra batalestro staras dekstre,
tio estas, li lokigas sin

laŭ la moro de la funebraj ceremonioj.

Mortigi grandnombre homojn,
tion oni priplendu per ploroj de kompatio.

Tiu, kiu venkis en la batalo,
restadu kiel ĉe funebra ceremonio..

Rimarkoj de Rikardo Vilhelmo


"La tuta teksto estas certe komento al la antaŭa. Wang Bi preteriras ĝin kun silento. En la malnovaj manuskriptoj ĝi ŝajne ne troviĝis."

Rimarkoj de Cezar

Ankaŭ Wang Chongfang mencias, ke troviĝas en la ĉapitro kelkaj frazoj interpolitaj kaj konfuzitaj, kiuj ŝajnis jam tiaj dum Handinastio.

Ĉiam se temas pri la temo paco, tuj aperas certaj prezentantoj de "pli altaj fortoj", kiuj tuj asertas, ke ekzistas gravaj aferoj kaj principoj, kiuj estas eĉ pli gravaj ol la mondopaco mem, uloj, kiuj uzas sian grandan influon por malhelpi la pensadon pri la paco, kaj kiuj eĉ ne hezitas endubigi la frazojn de famaj pacbatalantoj; tio certe jam estis tiel dum la regado de la Han-dinastio. La vero por certaj regantoj povas fariĝi tre malagraba, se ili ekzemple eĉ torturas en "siaj ministerioj de amo", kiel sarkasme mokis la verkisto Orwell en sia fama libro "1984". La unua imperiestro en Ĉinio brutale murdigis centojn de konfuceaj eruditoj evidente nur tial, ĉar ili ne volis akcepti centprocente la „diajn verojn“ de sia kvazaŭ dia imperiestro.

(daŭrigota)



(14)

Sur la stratoj senhomaj je tiu nokta horo, taksio, revenanta de malproksima veturado, subite haltis. Sur la trotuaro ja kuŝis juna viro, ŝajne malbonfarta. La ŝoforo elaŭtiĝis, iris al la kuŝanta homo.

“Batita! Videble tiu estis atakita kaj batita! Li estas senkonscia, sed li vivas.”

La ŝoforo rondrigardis, esperante vidi iun, kiu povus helpi. Malplaĉis al li lasi la junulon sola sur trotuare, dum li iras telefoni al la polico. Sed la strato estis plu senhoma.

Feliĉe, telefono troviĝis ne tre malproksime. Post nelonge, la polico estis informita. Plu pasis kelkaj minutoj kaj jen polica aŭto, kun turniĝanta lumo sur ĝi, rapidege alvenis al la loko, kie la taksioŝoforo atendis.

Milan estis eliĝanta el sia nekonscia stato. Li sukcesis sidigi sin.

“Nenio serioza,” diris unu el la du ĵus alvenintaj policistoj, post rapida kontrolo. “Nenio ŝajnas rompita. Ili trafis vin nur supraĵe.”

“Supraĵe, ĉu vere?” Milan respondis. “La doloro, kiun mi sentas, ne ŝajnas al mi supraĵa. Ĝajnas, kvazaŭ mia kapo baldaŭ eksplodos.”

“Ĉu vi sentas vin kapabla rakonti, kio okazis?”

“Nu, mi provis haltigi tiun teroriston, li ĵetis min teren, mi tamen tuj restariĝis, kuris post li, sed tiam aliaj atakis min de malantaŭe, mi ne vidis ilin, eĉ ne scias, kiom da ili estis. Tre rapide ili havigis al mi baton, ege dolorigan — eĉ se laŭ kelkaj nur supraĵan — kiu faligis min senkonscien.”

“Teroristo, ĉu? Kiu?”

“Nu, mi ne scias la nomon, sed lia foto troviĝas ĉie en la urbo, en la tuta lando, fakte. Polico serĉas lin.”

(daŭrigota)

La konspiro de la literoj

Simo estis lernanto, sed ne volis lerni kaj skribi: - Pro kio mi devas skribi mane tiujn literojn? Jen la komputilo. La literoj solaj ordiĝas. Ĉu ili estas belaj? Jes! ...

Lia patrino ne pensis tiel:

- Ĉiu homo devas scii skribi mane, scii la ortografiajn regulojn... Vi ne nur skribas iujn literojn dekstre, aliajn maldekstre, sed iuj estas malgrandaj, aliaj pli grandaj kaj vi ellasas iujn el ili. Ĉu estas iu lernanto en via klaso, kiu skribas tiel malbele kaj nekomprenible?

- Panjo, ili ĉiuj estas literpikantoj...

Li volis ĉesigi la dialogon, ĉar liaj amikoj ludis surstrate kaj li malfruiĝis. Tiel pasis tago post tago. Li revenis hejmen, rapide manĝetis kaj iris ludi. Vespere lacigita li rapide ekdormis. La knabo volis nur ludi.

Nekontentaj de li estis ankaŭ ĉiuj literoj. Ili pensis, pensis kaj decidis lin timigi kaj hontigi. Komprenible dum lia sonĝo. Iun nokton, kiam la luno similis al piedpilko, oni aŭdis altajn voĉojn.

- Sumo, venu ludi! - diris iu Muso.

- Mi estas Simo, ne Sumo...

- Vi eraris mian nomon, kiam vi skribis. Krom tio vi ne ŝatas vian kajeron. Ni iru ĝin manĝi...

- Aŭ! ...Kia malbela skribado!

Diris la Vulpo, kiu treege bone vidas.

rakontis kaj sendis Elena Popova, el Bulgario

- Vi ankaŭ mian nomon eraris...

Li malfermis larĝe sian buŝon. Simo ekkriis pro timo. La litero A estiĝis Aglo:

- Kiel vi iĝos aviadisto, se vi ne volas lerni?

Tiel litero post litero kriis:

- Stultulo!... Stultulo!...

Iu vesto volis lin piki kaj li vekigis timtremante. “Kia estis tiu sonĝo? Kiel la literoj viviĝis? - li sin demandis. Dum la sekvantaj tagoj Simo atentis en la lernejo. Li decidis: “Estas tempo, ke mi lernu serioze!”

Miraklo - tago post tago li skribis pli bone kaj sen eraroj. La instruistino skribis “Brave” ankaŭ en liaj kajeroj. Iu nokte dum la sonĝo, li vidis denove la literojn. Ili ridetis.

- “Brave! “diris la Formiko kaj la Abelso - ni scias, ke vi estas saĝa knabo.

Simo vekigis kontenta. La bela mateno promesis sukcesan tagon.



Ŝercoj



— Karulo, ĉu vi memoras? Iam vi demandis, kiu estas mia ŝatata manĝaĵo.

— Jes, komprenble mi nun bone rememoras. Ĝi okazis dum nia nuptovojaĝo antaŭ tri jaroj.

— Mi petegas, nun jam bonvolu kuiru alian!

- Amiko, ĉu vi frezeziĝis? Vi pruntedonis al fripono \$3000. Li prenis la monon kaj forkuris kun via edzino!

- Kara amiko, ĉu vi pensas ke mi estas stulta por doni monon simple tiel, vane?!

Avarulo alparolas viron:

— Sinjoro, mi deziras demandi ion.

Bonvolu ne koleri!

— Mi aŭskultas vin.

— Ĉu vi kutimis drinki?

— Mi neniam drinkas, eĉ unu guton da alkoholo.

— Bonege, bonvolu teni mian botelon da vino dum mi serĉas biletan por aŭtobuso

en mia poŝo!

Avarulo rigardante la foton de nudulino, li drinkas brandon. Li subite ekparolas malgaje:

— Ĉi tian diboĉan vivon mi ne povas daŭrigi plu. Mi elspezas mian tutan monon por virinoj kaj drinkaĵoj.



Krucvortenigmo



Horizontale

1. La nomo de doktorino kaj fama esperantistino kiu forpasis en la 30-a de la jam

pasinta aŭgusto; Interjekcio de kolero, malestimo, indigno, malbonŝanco ks.

2. Piulo, celanta animan perfektigon per korpaj rigoraĵoj; eventuala rimed', io kion oni povas fari.

3. Silabo, kiu montras en la relativa solfeĝo la duan tonon super la toniko; Numeralo, esprimanta la nombron post 999 en la serio de la entjeroj; la unua duonparto de la plej granda geokronologia unuo, ampleksanta plurajn eraojn kaj responda al la kronostratigrafia unuo eonotemo.

4. Malsano-simptomo, karakterizata de flaviĝo de la haŭto kaj de la okula konjunktivo; Senvokala salonmeblo, longa seĝo por pluraj personoj, kun dorsapogilo kaj remburita sidloko.

5. Resti sur la supraĵo de akvo; Agad' aŭ labor' de tiu, kiu bredas bestojn.

6. Eksceso; Dometo, destinita por loĝigi insektojn, kiuj produktas mielon kaj vakson.

7. Tiu, kiu praktikas sportan, artan ks aktivecon, ne estante specialisto, profesiulo.

8. Prefikso kun la senco «laŭforme inversa» pp organo sen laŭlarĝa simetriebeno; la bazo de la organo (i.a. petiolo aŭ pedunklo) estas spaca referenco, kaj la orientiĝo de la normala formo estas fiksita laŭ la tradicio;

Vertikala cilindro aŭ prismo, ordinare pli mallarĝa ĉe la supro, el ligno, ŝtono, giso k.a., uzata kiel subtenilo aŭ kiel ornamo de konstruaĵo.

9. La unua duono de blanka tuko, aŭ blanka surfaco, sur kiun oni projekcias luman bildon de objektoj; Sevokale

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1									■			
2							■		■			
3			■		■	■				■		
4							■		■			
5								■				
6					■							
7		■										■
8	■			■								■
9						■				■		
10								■				

resti sur seĝo, por ion fari; Sufikso sen difinita senco, uzata por derivi vortojn, kies rilato al la radiko estas malpreciza kaj ne esprimebla per alia sufikso.

10. Perforte kaj brue disrompi, dispecigi; arkaismo de armilo.

Vertikale

1. Homo, kiu iel vivas el la maro; Inverse la kemia simbolo de metalo, kies atomnumero estas 26.
2. Kontrakt' por protekti kontraŭ riskoj tiun, kiun ĝi liveras; Argila ter', kutime pulvoreca, de flaveta ĝis ruĝeta pro enhavo de ferikaj oksidoj, uzata kiel pigmento por farboj.
3. Inverse kaj senvokala laŭta subita sono de la voĉo; Partikulo, signifanta «pli ol sufiĉe, pli ol necese, pli ol ĝustamezure»; La unua silabo de la parto de la supra (aŭ antaŭa) membro de homo kaj simio, de la ŝultro ĝis la kubuto.
4. Regno en la suda parto de la Arabia duoninsulo (Sanao).
5. Inverse la nomo de la 24-a grafemo de la Esperanta alfabeto; Inverse la sufikso esprimanta kolekton de samspecaj ekzistaĵoj aŭ objektoj, formantaj unu tuton; Tia, ke ĝia rando estas tranĉa aŭ ĝia pinto pika.
6. La nomo de la 21-a grafemo de la Esperanta alfabeto; Inverse respekte honori, precipe per oferprezento;
7. Inverse lip'.
8. Unu el la kvin grandaj lagoj de Norda-Ameriko; Spirita atmosfer' de iu medio, loko ktp.
9. Havanta koloron mezan inter ora kaj kaŝtana, helflava.
10. Fabela estaĵ' de malsupera rango, dotita per supernaturaj povoj; Malsupra membro de dupiedulo, antaŭa aŭ malantaŭa membro de kvarpiedulo, aŭ membro de artropodo.
11. Tia ejo, ke ĉiuj ĝiaj punktoj estas proksime ĉe la sama nivelo, kaj ĝi prezentas nek kavaĵojn nek elstaraĵojn tro grandajn; Inverse la dekdua grafemo de la greka alfabeto (M, μ), uzata kiel simbolo de mikro.
12. Maltrankviliga zorgo, pena agado, por atingi, realigi ion (sen la meza 'o'); Memstare uzata morfemo, signifanta prefere nedaŭran inklinon al io.

(la solvo troviĝas en la lasta paĝo)


UEA pledas por ne-perforto

el UEA

La 2-an de oktobro, Unuiĝintaj Nacioj invitis la mondon kunsoloni la Internacian Tagon de Ne-perforto. La Tago celas disvastigi konscion pri la ne-pervorta vojo al solvado de konfliktoj, inspirite de la filozofio kaj persona ekzemplo de Mahatmo Gandhi, kiu nomis la ne-perforton “la plej granda potenco je la dispono de la homaro.”

En ĉi tiu tago, Universala Esperanto-Asocio deklaras sian firman subtenon por la alvoko de UN, kies aktualeco estas konfirmata ĉiutage per novaĵoj el ĉiuj kontinentoj. La principoj kaj agoj de ne-perforto

respondas al la streboj de la Esperanto-movado, per la disvastigo de lingvo neŭtrale homa, kultivi pacon, toleremon kaj komprenon tutmonde. Sekve, UEA krome kondamnas ajnan formon de perforto, kaj substrekas ke plena respekto al la homaj rajtoj estas nemalhavebla bazo por la konstruado de kulturo orientita al paco kaj interkompreniĝo inter la popoloj.



La Estraro de UEA



**International Day of Non-Violence
2 October**

**Internacia Tago de Ne-Perforto
2-a de oktobro**



Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

UEA

U religia frato, kiam fariĝis monaĥo ¹ disdonis siajn tutajn posedaĵojn sed retenis nur unu bonan bienon.

Iu monduma eminentulo havis deziron akiri tiun bienon kaj petis multfoje, ke la monaĥo vendu ĝin al li aŭ interŝanĝi ĝin kun iu alia ejo, sed la monaĥo neniam konsentis.

Tiu eminentulo iam fariĝis urbestro de la provinco, do li komencis ekzerci pli multan premon sur la monaĥo por ke li forlasu la bienon al li. Li plue komencis suferigi lin per la pasado de sia bestaro tra la terpeco de la bieno.

La situacio fariĝis tro malfacila por la monaĥo, kaj ĉar li ne sukcesis konvinki la estron petegante, li forkuris al iu fama kaj virta maljunulo kiu vivis proksime de la regiono kiel asketo ². La monaĥo iris kaj reiris multfoje al la virta maljunulo por peti helpon de li sed la virta maljunulo daŭre pelis lin dirante, ke li devis reveni kaj preĝi en sia ĉelo ³.


Kiam la monaĥo komprenis, ke la urbestro finfine forprenos lian bienon tiam li por lasta fojo kuris al la maljunulo kaj diris: "Je Dio, helpu min, skribu leteron al la urbestro aŭ sendu iun por paroli kun li". Do, la maljunulo, ĉar la monaĥo daŭre insistus pri tio kaj tro ĝenus lin, decidis skribi leteron al la urbestro. En la letero li skribis la jenajn vortojn: "La monaĥo estas monaĥo, li devas posedi nenion por ke la aliaj ne povu fari maljustaĵon al li, se li posedas ion, tiam lasu la aliajn fari maljustaĵojn al li, ĉar li ne plu valoros kiel monaĥo ankaŭ en la okuloj de Dio".

La maljunulo skribis sur la koverto la adreson de la urbestro kaj donis la leteron al la monaĥo por doni ĝin al la urbestro. La monaĥo ne sciis kion la maljunulo skribis en la letero al la urbestro, do li iris kaj donis la leteron al la urbestro, kiu akceptis ĝin kun multe da honoro kaj kisis la koverton ⁴ antaŭ ol li malfermis ĝin.

en tiu tempo.

Sed tiun penson de Bentham, trakti ĉiujn feliĉojn egale multaj aliaj pensuloj kritikis forte. Ekzemple Robert Nozic (1938-2002) rakontas, ke se estus maŝino kiu pere de virtuala realaĵo alportos al vi feliĉon, ekzemple ĝi povus ŝajnigi al vi, ke vi estas tiu, kiu trafis la mirindan golon en la monda pokalo de piedpilko ks, kaj tiu maŝino altigas vian feliĉon al tre alta nivelo, vi devas pasigi vian tutan postan vivon

Kiam li legis la leteron, li demandis al la monaĥo: "Ĉu vi scias kion la maljunulo skribis?", la monaĥo respondis kun konfido: "Jes, li skribis, ke vi lasu kaj foriru de mia bieno".



Tiam la urbestro admirante la virton de la maljunulo, forlasis la bienon kaj ne plu ĝenis la monaĥon.

Ni admiras la bonecon de Dio je la eco de virto, kiel tiu de la maljunulo kiu skribis la leteron, kaj kiu sen ia insulto aŭ minaco en sia letero konvinkis la malmolkoran urbestron kaj tiu kompatis la monaĥon, kiu dum longa tempo estis peteganta lin.

*** Tradukis Georgios Leventidis el la greka libro "Nekonataj paĝoj de la maljunulo" de eldonejo: La ĝardeno de Madono ***

¹ **monaĥo**. Ermito aŭ ano de religia komunumo, submetita al specialaj reguloj (ĝenerale rezigno pri personaj posedaĵoj k pri seksaj rilatoj)

² **asketo**. Piulo, celanta animan perfektigon per korpaj rigoraĵoj

³ **ĉelo**: Malgranda ĉambro por unu sola persono, en monaĥejo, malliberejo ks

⁴ Tiu ĉi estas antikva kutimo, kiam oni ricevas leteron de respektinda homo.



konektita al tiu maŝino. Estas aliaj aferoj, kiuj gravas por la homo, eble pli ol esti nur feliĉa, eble pli ol altigi la nivelon de feliĉo kaj malaltigi la nivelon de doloro. Ne ĉiuj vojoj kaj manieroj en vivo estas egalvaloraj.

<<<<<

(daŭrigota)

Mallonga Historio de Filozofio (21)




Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun filozofo Jeremy Bentham

Vasil Kadifeli

Jeremy Bentham (1748-1832)

Se vi iam vizitos la Universitatan Kolegion de Londono, vi renkontos Jeremy Bentham en vitra montrifenestro, sidanta kun sia bastono kaj rigardanta al vi. Li ĉiam pensis, ke anstataŭ sia statuo, montrisian veran korpon estus pli efektiva. Kvankam lia kapo nun estas en ligna skatolo kaj sur sia kolo nun estas vaksa kopio de ĝi, iam ankaŭ lia vera kapo estis en la montrifenestro.



Bentham havis multajn praktikajn ideojn, ekzemple la “apartamentforma malliberejo”, en kies centro estis turo por la gvardistoj kiuj gvertis la malliberulojn, kvankam ili ne certis pri tio, do ili kondukis bone kaj tiel en la fino ili konvertiĝis al bonaj homoj por la komunumo. Tian formon de konstruaĵo oni ankoraŭ uzas en kelkaj modernaj malliberejoj, bibliotekoj ks. Tiu estis unu projekto de li por la komunuma reformo.

Lia plej grava kaj efektiva teorio estis pri kiel ni devas vivi. Tiu estas la principo pri “utilismo” aŭ “la plej granda feliĉo”. Ni devas vivi tiel, ke ni atingu altan nivelon de feliĉo. Kvankam multaj aliaj filozoj, antaŭ ol li, pensis kaj parolis pri moralo, li estis la unua kiu priskribis, kiel oni devas praktiki tion. Li volis, ke la leĝoj de Britujo estu agorditaj tiel, ke ili alportu la plej altan nivelon de feliĉo al la komunumo.

Kio estas feliĉo? Kvankam povus esti diversaj difinoj pri tio, Bentham difinis ĝin precize: “tiel, kiel ni sentas nin”. Kaj tiu estas kiel eble pli multe da ĝuo kaj malmulte da doloro. Homo estas simpla, ĝi volas aferojn kiuj alportos ĝuadon pli ol doloro al li. Oni ne volas manĝi glaciaĵon nur pro la deziro posedi ĝin sed pro la ĝuo oni sentos manĝante ĝin.

Sed kiel oni mezuras feliĉon? Ĉu ni povas gradigi niajn feliĉajn momentojn? Bentham pensis, ke estis eble gradigi feliĉojn kaj plue estis eble kompari feliĉojn unu kun la alia. Li nomis sian metodon: la “matematiko de feliĉiĝo”. La unua paŝo estis gradigi la “ĝuo”n, kaj kalkuli kiom longe tiu “ĝuo” daŭros, kiom densa ĝi estas, kaj al kiuj pliaj postaj “ĝuoj” ĝi kontribuas. Poste oni devas subtrahi la “dolorojn”, kiun povas kaŭzi tiu “ĝuo” kaj do, restos la “neta grado de

tiu ĝuo”. Tion, li ankaŭ nomis: “la utileco de ĝuo”. Oni devas elekti la agon kiu alportos “ĝuon” kun la plej alta grado.

Bone, sed kiuj estas la fontoj de “ĝuo”? Eble ia altnivela ago kiel “legi poemon” alportos pli grandan “ĝuon” ol ia malaltnivela ago kiel “manĝi glaciaĵon”, ĉu ne? Laŭ Bentham tute ne gravas kiel la ĝuo estas kreita. Ĉar nur imagi ion povas kaŭzi la saman nivelon de feliĉo kiel la ago spekti teatraĵon de Ŝekspiro. Se la nivelo de “ĝuo” estas la sama, la valoro de la agoj estas la samaj. Kiel vi lernis en la ataŭaj du numeroj (#021 kaj #022) Immanuel Kant diris, ke nia devo estas neniam mensogi. Sed laŭ Bentham ni devas kalkuli la rezultojn de niaj agoj, aŭ bonaj aŭ malbonaj. Mensogo ne ĉiam estas malbona, kaj povas foje mensogo esti io bona. Ekzemple iu amiko de vi aĉetas novan vestaĵon, kiu laŭ vi ne estas bela. Laŭ Kant oni devas ĉiam diri la veron, do sian veran opinion pri la vestaĵo, sed iu kiu kredas je utilismo povas mensogeti ĉar tiu alportos pli grandan utilon ol tiun, kiun alportos la vero.

Utilismo estis radikala teorio en la fino de la 18-a jarcento. Kaj ankaŭ radikala estis pensi, ke ĉies feliĉo estas la sama en la kalkulado de feliĉo. Bentham diras ke ĉiuj estas samaj, la feliĉo de iu laboristo estas la sama kun la feliĉo de iu aristokrato. Sed en tiu tempo la komunumo estis malsimila ol tiu de nia. Aristokratoj havis la povon decidi kion fari pri la tero, kaj ili ankaŭ havis denaskajn rajtojn partopreni la ĉambron de



lordoj kaj fari la leĝojn. Do kelkaj homoj tiam estis malfeliĉaj pri la pensoj de Bentham. Bentham plue diris, ke bestoj havas la rajton esti feliĉaj, ili ne estas malsimilaj ol ni, homoj. Kaj tiu estis eĉ pli radikala diro



Tekrar merhaba,

Avustralyalı G.Gladstone Solomon'un "Esperanto por infanoj" adlı kitaptan kursumuza devam ediyoruz .

Derslerin sonuna yeni ekler, kelimeler ve dilbilgisi ile ilgili kısa notlar veriyoruz. Eski dergilerinizi atmayın

çünkü bu dilbilgisi açıklamalarını bir kere veriyoruz, sonraki derslerde bunları bildiğinizi varsayıyoruz. Aklınıza takılan bir şey olduğunda önceki sayılara dönüp yaptığımız açıklamaları hatırlamaya çalışın.

Metin içindeki tirelerin ("-") kelime ön ve arka ekleri ile birleşik kelimelerin ana kelimelerini gözle ayırtılabilmek için kullanılıyor.

"IG" (SEN ĈAPELO)

"Hieraŭ ni ne havis la tempon por lerni la signifon de la sufikso 'ig' sen ĉapelo" diris la instruistino, la proksiman tagon. "Tion vi lernos hodiaŭ."

"Nu, Atentu! Se mi metas inkon en la akvon, la akvo malpur-iĝ-as, ĉu ne?"

Dum ŝi parolis, ŝi metis inkon en akvon.

"Jes," respondis la infanoj, "tion ni lernis hieraŭ."

"Sed estas mi, Farŭlino Saĝa, kiu malpur-ig-as la akvon, ĉu ne?"

"Ho, jes," diris Johano, "kaj estas tre malbone malpur-ig-i la belan puran akvon."

"Silentu, Johano! Ĉu vi vidas la diferencon inter 'la akvo malpur-iĝ-as' kaj 'mi malpur-ig-as la akvon'?"

"Jes, ni bone vidas la diferencon," respondis la infanoj.

"Kaj se mi metus mian poŝ-tukon en la akvon, la poŝtuko malsek-iĝ-us, sed estus mi, kiu malsek-ig-us ĝin."

(Sed ŝi ne metis sian poŝtukon en la akvon.)

"Jes, certe, estus vi, kiu malsek-ig-us ĝin."

"Nu, rigardu! Mi prenas blankan pilkon, kaj mi metas ĝin en la inkon. Do, mi nigr-ig-as la pilkon. Ĝi stis blanka; nun ĝi estas nigra pilko."

"Tio estas ĝusta."

"Jen plua ekzemplo. Se mi tranĉus mian fingron per tranĉilo (sed ŝi ne tranĉis ĝin. Ho, ne!), la sango flu-us, ĉu ne? Do, se mi metus mian poŝtukon ĉirkaŭ mian fingron, la sango ruĝ-ig-us ĝin; ĉu ne?"

"Jes, la sango ĉiam ruĝ-ig-as ĉion, kion ĝi tuŝas."

"Nu," diris Fraŭlino Saĝa, "hodiaŭ estas bela vetero. Estas varme; la suno brilas; la vento blovas dolĉe; la birdoj kantas en la arboj. Hodiaŭ vi povas havi liberan tagon."

La infanoj man-frapis, kaj kriis pro ĝojo. Libera tago! Libera tago, dum la suno brilas en la ĉielo, kaj la birdoj kantas en la arboj. Ili povos kolekti florojn; ili povos serĉi bird-nestojn (sed ili ne estas kruelaj; ili neniam prenas la ovojn, nek rompas la nestojn. Ne, ili estas bonkoraj). Ili povos ludi en la arb-ar-o, ¹ en la ombro de la arboj. Ho, ili estis tre ĝojaj.

* * * *

Sed Johano ne volis serĉi bird-nestojn. Li ne volis ludi en la ombra arb-ar-o. Li ne volis kolekti florojn.

Johano volis labori!

Li trovis sitelon, plenan de blank-aĵo. Li trovis ankaŭ grandan broson.

Tiam li iĝ-s afero-plena!

Li blank-ig-is la rondan tablon; li blank-ig-is la fenestrojn de la ter-etaĝo. Tiam li trovis ŝtup-et-ar-on, kaj blank-ig-is la fenestrojn de la unua etaĝo, kaj la kamen-tubon.

Tiam li kaptis la katidon kaj trempis ĝin en la sitelon de blank-aĵ-o, kaj blank-ig-is la katidon ankaŭ.

Tiam li trempis la pupon de Sila en la blak-aĵ-on, kaj blank-ig-is ĝin. Tiam li prenis fulgon

de la kamen-tubo, kaj nigr-ig-is la librojn de Roĝero. Tiam li nigr-ig-is sian kol-um-on, kaj la blankan tablo-tukon.

"Nu," diris la malbona museto, "mi blank-ig-is la fenestrojn, mi blank-ig-is la rondan tablon; mi nigr-ig-is la tablo-tukon kaj mian kol-um-on; mi blank-ig-is la katidon. Ho, mi komprenas bone la signifon de la sufikso "ig" sen ĉapelo!"

* * * *

Kiam la patrino revenis el la butikoj, ŝi sufer-ig-is sian fileton!

* * * *

Dume, Roĝero kaj Ŝila lernis:

Mario havis ŝafideton,	La instruisto ĝin forsendis,
Ĝi portas blankan lanon;	Sed ĉe la pordo ĝi
Kaj kien ajn Mario iris,	Kun pacienco atendadis
Ĝi sekvis ŝian manon.	La venon de Mari'.

Ĝi iris kun ŝi al lernejo,	"Pro kio, do, ĝi amas ŝin?"
Sed kontraŭ la regulo;	La infanaro miris.
Kaj la infanoj multe ridis	"Nu! ĉar Mario amas ĝin,"
Pro vido de l'novulo.	La instruisto diris.

¹ multaj arboj faras arb-ar-on

Ekler:

- ar- Bir ismi çoĝul hale getirir: vagon-o > vagon-ar-o (vagon > vagon katarı, vagon sürüsü veya tren)
- ad kelimenin anlamına yinelenme, tekrarlanma anlamını katar
- ig- Geçişsiz olan bir fiili veya bir sıfatı geçişli hale getirir (dormi -> dormigi = uyumak > uyutmak)
- iĝ- Geçişli olan bir fiili veya sıfatı geçişsiz hale getirir (veki -> vekigi = uyandırmak > uyanmak)

Sözlük		infano	çocuk	rompi	kırmak
afero-plena	bir sürü yapacak şeyi olan	infanaro	çocuklar, çocuk grubu	sendi	göndermek
atendi	beklemek	kolumo	yaka	forsendi	uzağa göndermek
atendadi	sürekli beklemek	malseka	ıslak	si, sin	kendi, kendisini
blanka	beyaz	malsekigi	ıslatmak	sia, sian	kendisine ait,
blankigi	beyazlatmak	malsekiĝi	ıslanmak	sitelo	kendisine ait olanı
blankiĝi	beyazlanmak	miri	şaşırmak,	stupetaro	kova
blankaĵo	beyaz boya	nesto	hayran olmak		küçük basamak
dume	bu arada	nigra	yuva		grubu, küçük
etaĝo	bina katı	nigriĝi	siyah	stupo	merdiven
fingro	parmak	nigriĝi	siyahlamak	suferi	basamak
flui	akmak	nova	siyahlanmak	suferigi	eziyet çekmek
fulgo	kurum,	novulo	yeni	teretaĝo	eziyet çektirmek
	tam yanmamış odun	ombro	yeni kişi	trempi	zemin kat
ĝusta	doĝru	regulo	gölge		banmak
			kural		

J en biskvitoj tre simplaj kaj rapidaj, pretaj en malmultaj minutoj!

Ingrediencoj:

- 200 gramoj da faruno
- 90 gramoj da butero
- 80 gramoj da sukero
- 2 ovoj
- 1 duono koverteto de fermento
- 1 pomo
- 1 pinĉaĵo da salo



Ni metu sur ebenaĵo la farunon kaj faru grandan truon en la centro kiel vulkano. Ni miksu la sukeron, la buteron, la ovojn, la fermenton kaj la salon. Ni tranĉu la pomon en malgrandaj kubo, enkorpu ĝin en la komponaĵo kaj daŭru knedi. Ni deigu iom de knedaĵo kaj donu la formon kiun ni preferas al niaj biskvitoj. Mi formis globetoj kaj mi premigis ilin donante rondan

formon. Ni tegu rostopaton kun fornopapero kaj metu la biskvitojn ĉi tie. Baku ĝin en la forno al 180 ° por ĉirkaŭ 15-20 minutoj. Niaj biskvitoj estas pretaj!

Bonan apetiton!

Fonto: <https://kuirukunmi.com/2014/06/23/biskvitoj-kun-pomoj/>

Kiu estas via Eo-nivelo?

Vi povas

esprimi simplajn frazojn havi bazan konversacion



A1 - A2
Unuaj pasoj Elano

Vi povas

komuniki uzante cxiutagajn vortprovizojn kaj gramatikon kompreni kompleksajn temojn en cxiutagaj konversacioj



B1 - B2
Salto Flugo

Vi povas

uzi la lingvon flekse kaj efike en diversaj sociaj kaj fakaj kontaktoj kompreni sen ajna malfacileco cxiajn parolojn kaj skribi kompleksajn leterojn, raportojn aux artikolojn



C1 - C2
Auxtonomieco Pinto

Filmo pri la 102-a Universala Kongreso en Seulo



Solvo de la krucvort-enigma



Jes! Mi parolas Esperanton!

10	O		M	R	A			S	A	K	A	R	F
9	M		U		D	S			R		R	K	E
8	E			O	N	O	L	O	K		B	O	
7			O	R	O	A	T	A	M				O
6	O		J	U	L	E	B	A		O	O	R	O
5	D			R	E	B		I	A	N	A	S	U
4	P		N	K		O		R	O	R	E	K	I
3	O			E		L		M		M		R	E
2	L		B	E		R		O	T	E	K	A	S
1	K		F	E		I		R	O	A	R	A	M
12													